

EL POPOLA

中國報通

ĈINIO


10 1981





La hejmloko

La pando estas unu el la plej raraj animaloj en la mondo. Belaj kaj mildaj, pandoj prenas bambuetojn kiel sian nutraĵon. Ili vivas en densaj arbaroj de la provincoj Sichuan, Gansu kaj Shaanxi de Ĉinio. Por protekti ilin, la ĉina registaro starigis rezervejon en ilia hejmloko.



Pando



de pandoj

Fotoj de PU TAO

Laborantoj de la rezervejo observas la vivon de pando.





Pando

EL POPOLA ĈINIO

1981
N-ro 10
(277)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Lotuso en burĝonado

Foto de LI CHONGYI

SUR LA DORSKOVRILO:

Bubalo (Ĉinstila pentraĵo)

de ZHENG NAIGUANG

La aŭtoro por delikataj tuĉoj kaj iom ruĝbruna koloro pentris la vivoveran bubalon. Lia pentrarto impresas per senĝeneco kaj facileco.

KOLORAJ SERIOJ:

La hejmloko de pandoj

Pejzaĝoj de Dongting-monto

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj

La kanto kaj danco de la jaŭ-oj

Loulan — antikva urbo sub sablo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ekfunkciis la baraĵo de Gezhoubu

Sur strato de Ruili

La Naskiĝtago de Ŝakjamunio

Nova takso pri la historia pozicio de Mao Zedong	2
La nuna stato de la ĉina ekonomio kaj novaj politikoj por ĝia disvolviĝo	6
Vojaĝo en grenejo sude de Changjiang-rivero	10
Konstruantoj de la hidroelektraj Gezhoubu	16
KURANTAJ AFEROJ	17
NIA KULTIVEJO: Etimologiaj duoblaĵoj en Esperanto	18
Zheng Zhenduo kaj la Esperanto-Asocio de Jinan-universitato de Shanghai	20
SUR NIA LIBROBRETO: El Ĉina Poezio	21
Nove Ricevitaj Libroj	22
VIDINDAJ LOKOJ: Dongtingshan-monto	23
KULTURAJ NOTOJ	25
ESP-NOVAĴOJ	26
Ni estas filoj de "Torĉo"	28
Popola edukisto Tao Xingzhi	30
«Ĉina Granda Enciklopedio» en Redaktado	33
Chen Jinnong kaj lia violono premiita per ora medalo	34
Iama okazintaĵo (poemo)	36
SPORTO	37
KORESPONDI DEZIRAS	37
La problemoj alfrontataj de la ekonomio de la disvolviĝantaj landoj	38
AMIKECO: "Longa navigado de Sindbad"	40
KALEJDOSKOPO	42
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Kontraŭjapana Rezistmilito (II)	44
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Loulan — antikva urbo sub sablo	47

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

NOVA TAKSO PRI LA HISTORIA POZICIO DE MAO ZEDONG

“Antaŭe ŝajnis al ni, ke prezidanto Mao vivas en la ĉielo. Ni adoris lin kiel dion, sed restis malproksimaj de li. Hodiaŭ la rezolucio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pritraktis liajn meritojn kaj erarojn. Ĝi faris impreson, kvazaŭ oni invitus lin en la homan mondon kaj li ekvivus inter ni ordinaruloj. Ni rimarkis, ke ankaŭ li estas homo. Li fariĝis proksima al ni, kaj ni, niavice, prenas lin intima!”

Tion diris loĝanto de la urbo Urumqi (Urumĉi) de Xinjiang (Hingiang), post kiam la Sesa Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio aprobis la “Rezolucion pri Kelkaj Historiaj Problemoj de la Partio post la Fondiĝo de la Respubliko”, kiu taksis la historian pozicion de prezidanto Mao Zedong. Jes, plejparto de la ĉinoj, kiuj legis la rezolucion, samopinias kun tiu ordinara loĝanto en la fora limregiono.

La apero de la fenomeno de persona kulto al Mao Zedong trapasis procezon. Ekde la 60-aj jaroj la tiama nacidefenda ministro Lin Biao kun kaŝita intenco plenforte laŭdegis Mao Zedong, ke li estas tre tre granda, “ĉiu el liaj vortoj signifas veron kaj ĉiu el ili valoras dekmiloble”, ke “oni devas plenumi liajn vortojn ĉiakaze, ĉu oni komprenas aŭ ne”, ktp. Tio kreskigis la per-

sonan kulton. Tiam eĉ Mao Zedong mem abomenis flataĵojn de Lin Biao, ke li altigis lian prestiĝon ŝajne, sed fakte la sian. Post la morto de Lin Biao, Jiang Qing kaj aliaj heredis lian agmanieron. Tiel en la okuloj de la ĉina popolo Mao Zedong fariĝis netuŝebla sanktulo. Nun la Sesa Plena Sesio juste taksis la historian pozicion de Mao Zedong. Ĝi montris liajn grandajn meritojn kaj samtempe liajn gravajn erarojn. La justa takso pri Mao Zedong venigis lin de la ĉielo al la homa mondo kaj restarigis lian intiman figuron en la koro de la popolo.

Sendube, Mao Zedong estis gvidanto pli amata de la popolo ol la aliaj revoluciistoj en la historio de la ĉina revolucio kaj ankaŭ granda homo de nia tempo ĝenerale respektata en la mondo. Ne estas hazarde, ke li ricevis la amon kaj respekton de la publiko. Ĉiu, kiu konas la historion de Ĉinio, scias, ke de la mezo de la 19-a jarcento la imperiismaj potencoj agredis Ĉinion senĉese kaj la granda orientita imperio fariĝis duonkolonia kaj duonfeŭda lando. La Revolucio de 1911 gvidata de la granda revolucia pioniro Sun Jatsen renversis Qing-dinastion, tamen ĝi ne ŝanĝis la duonkolonian kaj duonfeŭdan naturon de la ĉina socio. Nur la Komunista Partio de Ĉinio montris la veran vojon al la ĉina popolo.

Dum la 28 jaroj de sia naskiĝo en 1921 ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la Kompartio gvidis sian popolon en la malfacilegaj bataloj. Antaŭ la konfirmo de la gvida pozicio de Mao Zedong en la Partio en januaro de 1935, la ĉina revolucio suferis tre grandajn malvenkojn pro la erara gvido de la dekstra kaj “maldekstra” oportunismo de la ĉefaj gvidantoj de la Partio. Estis neniu alia ol Mao Zedong, kiu kune kun aliaj gvidantoj metis finon al la erara gvido. Li iniciatis la kamparajn bazlokojn, prezentis sian strategian penson sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine kapti la urbojn kaj kreis novan revolucionan vojon kapti regpotencon per armitaj fortoj. Sub lia gvido la Partio venkis multajn malfacilojn kaj fine turnis la revolucion de malvenko al venko. Sen lia plurfoja savo de la ĉina revolucio el krizoj, la ĉina popolo baraktus eble pli longe en mallumo. Tiel en la longtempa batalo Mao Zedong estis agnoskita kiel granda gvidanto de la ĉina Partio kaj la ĉina popolo, kaj Maozedongpenso, kiu naskiĝis en la kuna batalo de la Partio kaj la popolo, estis agnoskita kiel gvida penso de la Partio.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, sub la gvido de la Kompartio kaj Mao Zedong la ĉina popolo kondukis la socialisman revolucion kaj la

socialisman konstruadon — ĝi faris ŝanĝojn plej profundajn en la ĉina historio. Laŭ la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj kreitaj de la venko de la nov-demokratia revolucio por transiro al socialismo, la Partio kaj Mao Zedong adoptis la principon de samtempa socialisma industriigo kaj socialisma transformado, praktikis konkretajn politikojn de laŭpaŝa transformado de posedsistemo de produktaj rimedoj, kaj teorie kaj praktike solvis la malfacilan problemon konstrui socialismon en Ĉinio, la ekonomie kaj kulture postiĝinta lando kun ĉ. kvarono de la monda loĝantaro.

De oktobro de 1949 ĝis 1956 la ĉina popolo laŭpaŝe efektivigis la transiron de la nova demokratio al socialismo, rapide restarigis la nacian ekonomion kaj disvolvis laŭplanan ekonomian konstruadon, kaj, preskaŭ en ĉiuj partoj de la lando, plenumis la socialisman transformadon al la privata posedsistemo de produktaj rimedoj. En tiu historia periodo, la gvida principo kaj fundamentaj politikoj, difinitaj de la Partio sub la gvido de Mao Zedong, estis ĝustaj kaj la akiritaj sukcesoj estis grandaj.

Post fundamenta plenumo de la socialisma transformado la ĉina popolo sin turnis al la grand-skala socialisma konstruado. Ĝis 1966, kvankam Ĉinio suferis seriozajn damaĝojn, ĝi tamen akiris grandan sukceson. Granda parto de la materia kaj teknika bazo, sur kiu Ĉinio entreprenas nun la modernigan konstruadon, estis kreita en tiu periodo; ankaŭ la ĉefaj fortoj por la tutlanda ekonomia kaj kultura konstruado estis kulturitaj kaj ilia sperto de laboro akumulita en tiu periodo ĝe-



En la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco en septembro de 1949, Mao Zedong estis elektita kiel prezidanto de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko.

nerale. Multaj teorioj pri la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado elmetitaj de Mao Zedong en tiu periodo, surbaze de la praktiko, ankoraŭ havas gravan signifon por gvido.

Tamen dum la dek jaroj de 1956 ĝis 1966, aperis gravaj

eraroj de la principo en la laboro de la ĉina Partio. Ekz-e en 1958, pro manko de sperto pri la socialisma konstruado, precipe pro fieriĝo kaj memkontentiĝo pro la akiritaj sukcesoj kaj troa urĝo al sukceso, Mao Zedong kaj nemalmultaj centraj kaj lokaj gvi-

dantoj tro grandigis la rolon de subjektivaj volo kaj kapablo kaj facilanime disvolvis la movadojn de la granda salto kaj la kampara popolkomunismo sen seriozaj enketado, esplorado kaj eksperimentado, tial inundiĝis maldekstremaj eraroj markitaj ĉefe per altaj normoj, blinda komando, fanfarona laborstilo kaj "tuja transiro en komunisman socion". Kaj krome, la naturaj katastrofoj kaj la ekonomia premo de la alia lando kaŭzis al la ĉina nacia ekonomio grandegajn malfacilojn en 1959-1961. Poste la ĉina nacia ekonomio glate disvolviĝis en 1962-1966, dank' al praktikado de la politiko "reĝustigo, firmigo, perfektigo kaj altigo", ĉerpado de la leciono en la granda salto kaj korektado de la maldekstremaj eraroj en la kampara laboro.

Sed la maldekstremaj eraroj en la gvida penso de la ekonomia laboro estis ne tute korektitaj, kaj ili eĉ kreskis en la politika, ideologia kaj kultura flan-

koj. En sia parolado en plena sesio de la Centra Komitato de la Partio Mao Zedong grandigis kaj absolutigis la klasbatalon ekzistantan en certa sfero de la socialisma socio. En la socialisma eduka movado, disvolvita laŭ la spirito de lia parolado, multaj kamparaj kadroj de la baza nivelo estis maljuste atakataj; iuj literaturaj kaj artaj verkoj, akademias vidpunktoj kaj reprezentantaj personoj de la literaturaj, artaj kaj akademias rondoj estis erare kritikataj; kaj seriozaj maldekstremaj eraroj aperis en traktado de intelektuloj kaj ankaŭ en traktado de la problemoj de edukado, scienco kaj kulturo. Ĉio tio fariĝis poste meĉo de la granda kultura revolucio.

Pri la eraroj en la laboro dum tiu periodo, kiel la rezolucio montris, devas prirespondi la gvidantaro de la Centra Komitato de la Partio kaj ĉefe Mao Zedong, sed oni ne devas atribui ĉiujn erarojn al li sola.

La kultura revolucio daŭranta de majo 1966 ĝis oktobro 1976 kaŭzis al la Partio, ŝtato kaj popolo de Ĉinio damaĝojn kaj perdojn plej pezajn post la fondiĝo de la respubliko. Nun oni nomas ĝin periodo de dek-jara ĥaoso.

Tiu kultura revolucio estis iniciatita kaj gvidita de Mao Zedong. Li opiniis, ke granda nombro da reprezentantaj personoj de la burĝaro jam enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn kaj la gvidantecco de sufiĉe granda parto de la organizoj jam ne estas en la manoj de la marksistoj kaj popolamasoj. Li opiniis ankaŭ, ke la diversaj antaŭaj bataloj ne povis solvi la problemon kaj nur kiam oni kondukas la kulturalan revolucion kaj mobilizas la vastajn popolamasojn por malkovri, de malsupre ĝis supre, la malluman flankon, tiam oni povas rekapti la potencon uzurpitan de potenctenantoj irantaj



En 1939, kamarado Mao Zedong intime interparolis kun kamparanoj de Yangjialing, Yan'an.

la kapitalisman vojon, kaj ke tio estas esence granda politika revolucio, en kiu unu klaso renversas la alian, kaj ĝi devas ripetiĝi plurfoje estonte. Tiuj liaj maldekstremaj vidpunktoj estis resumitaj en la tezon “daŭrigi la revolucion sub la diktaturo de la proletaro”. Evidente ili deviis de Maozedongpenso, kombinaĵo de fundamentaj teorioj de Marksismo-Leninismo kaj konkreta praktiko de la ĉina revolucio, kaj oni devas distingi ilin tute de Maozedongpenso.

Post la komenco de la kultura revolucio la diversnivelaj organizoj de la Partio estis atakataj ĝenerale kaj paralizigis aŭ duonparalizigis, la diversnivelaj gvidantoj de la Partio estis kritikataj kaj kontraŭbatalataj ĝenerale, kaj ankaŭ multaj amasoj estis atakataj pli-malpli peze. Profitante la ŝancon, intriguloj kaj karieristoj Lin Biao, Jiang Qing kaj aliaj, en la vestoj de maldekstruloj, uzurpis tre grandan parton de la centra potenco kaj instigis “faligi ĉion kaj fari plenampleksan internan militon”. Tio kaŭzis grandan malordon en la socio kaj seriozan detruon en la industria kaj agrikultura produktado. Pro tio la ĉina nacia ekonomio alfrontis danĝeron de disfalo, kiam la kontraŭrevolucia kliko de Jiang Qing estis frakasita kaj la ĥaoso de la kultura revolucio finiĝis en oktobro de 1976. La historio pruvis, ke la kultura revolucio estis interna ĥaoso erare levita de gvidanto, utiligita de la kontraŭrevoluciaj klikoj kaj kaŭzinta seriozan katastrofon al la Partio, ŝtato kaj popolo de Ĉinio.

Pri la kultura revolucio — serioza maldekstrema eraro longdaŭra kaj tuteca — Mao



En 1959, prezidanto Mao Zedong intime interparolis kun ŝtalistoj dum sia inspektado en Anhui-provinco.

Zedong devas ĉefe prirespondi. La Sesa Plena Sesio montris, ke la eraro de Mao Zedong estas tiu farita de granda proleta revoluciisto. Kiam li estis faranta grandan eraron, li ankoraŭ plurfoje postulis, ke ĉiuj membroj de la Partio serioze studu verkojn de Marks, Engels kaj Lenin, kaj ĉiam pensis, ke liaj teorioj kaj praktiko estas marksismaj kaj necesaj por firmigi la diktaturon de la proletaro. Ĝuste en tio kuŝas lia tragedio.

Kvankam Mao Zedong ĉiam persistis en la eraro de la kultura revolucio en la tuteco, tamen li ankaŭ haltigis kaj korektis iujn konkretajn erarojn kaj protektis iujn partiajn gvidantojn kaj eksterpartiajn emi-

mentulojn, ke iuj el ili revenis al sia gvida posteno. Li ankaŭ gvidis la batalon por frakasi la kontraŭrevolucian klikon de Lin Biao, kritikis kaj malkaŝis Jiang Qing kaj ŝiajn kunulojn kaj malsukcesigis ilian ambicion uzurpi la plej altan gvidantecon. En siaj lastaj jaroj li, kiel antaŭe, tenis viglan gardemon por la sekureco de Ĉinio, praktikis ĝustan eksteran politikon, firme subtenis la popolojn de diversaj landoj en iliaj justaj bataloj kaj elmetis gravan ideon, ke Ĉinio neniam ĉasos hegemonion. En la kultura revolucio la ĉina Kompartio ne frakasigis sed restis unuigita, la bazo de la socialisma sistemo de Ĉinio konserviĝis, la socialisma konstruado estis iranta kaj Ĉinio tenis

LA NUNA STATO DE LA ĈINA EKONOMIO KAJ NOVAJ POLITIKOJ POR ĜIA DISVOLVIĜO

LA NUNA STATO DE LA ĈINA EKONOMIO

Antaŭ la Liberiĝo Ĉinio estis lando duonfeŭda kaj duonkolonia. Ĝia ekonomio estis postĝininta kaj ĝia popolo vivis mizere. Post la Liberiĝo la ĉina registaro prenis tiujn du problemojn kiel gravan strategian taskon. Por plenumi la taskon la ĉina registaro faris penigajn laborojn kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Tamen, pro manko de sperto kaj hastemo en disvolvo de la ekonomio, ni plurfoje tro akcentis grandskalan konstruon kun alta rapideco, solflanke disvolvis la pezan industrion, neglektis agrikulturon kaj la malpezan industrion kaj tiel kaŭzis anormalan disvolviĝon al la ekonomia strukturo. Kvankam la investita sumo estis granda, tamen la efiko estis malgranda, tiel ke la socia riĉaĵo pliiĝis malmulte kaj

la popola vivo ne povis pliboniĝi rapide. Nun ni faras reordigon al la ekonomia strukturo ĝuste por radikale ŝanĝi la diritan staton.

Por fari tian reordigon, antaŭ ĉio oni devas konsideri la ekonomian forton de Ĉinio (la meznombra produktovaloro de ĉiu civitano en 1979 estis nur 253 usonaj dolaroj), kaj ĝustigi la rilaton inter la ekonomia konstruado kaj la popola vivo. En la pasintaj dekkelkaj jaroj la akumulita sumo (inkluzive de fiksa kapitalo kaj cirkula kapitalo) superis 30% de la totala enspezo de la nacia ekonomio. Tiu proporcio estis multe pli alta ol tiu de multaj evoluintaj kapitalismaj landoj. La investita sumo uziĝis ĉefe por disvolvi la pezan industrion. Tiel la investo por la agrikulturo kaj la malpeza industrio estis malgrandigita, kio

malhelpis la disvolviĝon de la lastaj du. De 1950 ĝis 1980 la produktado de la peza industrio pliiĝis 64-oble, tiu de la malpeza industrio 20-oble kaj tiu de agrikulturo nur 2-oble. La produktado de ĉiutagaj bezonaĵoj estis tiel malrapida, ke la pliboniĝo de la popola vivo estis malmulta. En la unuaj ok jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la produkta disvolvo kaj la pliboniĝo de la popola vivo iris sufiĉe rapide kaj la aktiveco de la laboranta popolo estis tre alta. La trijara "Granda Salto" ekde 1958, precipe la kultura revolucio ekde 1966, kaŭzis du grandajn damaĝojn al la ekonomio. Kaj plie, la proporcio de kapitala akumulado estis tro granda, kaj dum la 20 jaroj la popola vivo pliboniĝis malmulte, tiel ke la aktiveco de la laboranta popolo estis damaĝita.

sian unuecon kaj havis gravan influon sur la mondo. Tiuj gravaj faktoj estis nedisigeblaj de la granda rolo de Mao Zedong.

Estas kompreneble, ke Mao Zedong neeviteble faris tiajn kaj aliajn erarojn kiel multaj aliaj grandaj personoj starantaj antaŭ la historia tajdo, kiuj havis siajn mankojn kaj erarojn ĝenerale. En siaj lastaj jaroj li estis longtempe amata de la tuta Partio kaj diversnaciecaj popolanoj de la lando kaj

pro tio li tro fidis sin mem, pli kaj pli serioze izolis sin de la realo, de la amasoj kaj precipe de la kolektiva gvido de la Partio, ofte rifuzis, eĉ subpremis alies ĝustajn opiniojn kaj tiel ne povis ne fari multajn erarojn en sia laboro kaj eĉ la seriozan eraron tutecan kaj longdaŭran, kiel en la kultura revolucio. Nature, tiu komplika fenomeno estis produktaĵo sub certaj historiaj kondiĉoj kaj ne devas esti rigardata kiel kaŭzita de iu sola.

Ĉar Ĉinio estas lando kun tre longa feŭdisma historio, tial ne estas tre facile elimini la malbonan influon de la feŭda despotismo en la ideologia-politika kampo. Kaj krome, pro diversaj historiaj kaŭzoj la ĉina Partio ne sistemigis kaj leĝigis enpartian demokration kaj la demokration de la ŝtata politiko kaj la socia vivo, aŭ kvankam la leĝoj estis faritaj, tamen ili ne havis necesan aŭtoritaton. Tio kreis kondiĉon, ke la partia gvi-

Post la frakaso de la kvarpersona bando en 1976, ni ekhavis la eblecon konduki la ekonomian konstruadon sur novan vojon. Tamen ni subtaksis la perdon alportitan de la kultura revolucio, kaj ne sufiĉe konis la damaĝon de troakcento de alta rapideco kaj grandskala konstruado, en 1978 ni elmetis malfacile plenumoblajn taskojn, kiuj estis ne konformaj al la realo, rezulte de tio la investaĵo por la fundamenta konstruado de 1978 pliiĝis je 50% ol tiu de 1977. Precipe ni tro haste subskribis tro multajn interkonsentojn pri importado de fremdlandaj ekipaĵoj-kompletoj, kio plivastigis la skalon de la fundamenta konstruado kaj malkaŝis la malekvilibron de la proporcioj de la nacia ekonomio.

TASKOJ DE 1981

En la komenco de 1979, la ĉina registaro decidis praktiki la politikon de "reordigo, reformo, reĝustigo kaj altigo" al la nacia ekonomio. Tio estas tute prava. Por raciigi la rilaton inter akumulado kaj konsumado, la ŝtato multe reduktis la investon por la ekonomia konstruado, altigis la aĉetprezaron de agrikulturaj kaj


danteco tro koncentriĝis sur individuajn personojn kaj individua despoteco kaj persona kulto kreskis en la Partio. Tial estis malfacile por la Partio kaj la ŝtato preventi kaj bremsi la erarojn de Mao Zedong.

Malgraŭ tio, Mao Zedong ankoraŭ estis granda marksisto, granda proleta revoluciisto, strategiisto kaj teoriisto, kaj la plej granda nacia heroo en la historio de la ĉina nacio. Li faris neforviŝeblajn meritojn

neagrikulturaj produktaĵoj kaj pliigis la salajron kaj premion de oficistoj kaj laboristoj. Ĉio ĉi tio estis aprobita de la popolamasoj. Tamen, la investo de 1979 por la ekonomia konstruado ne estis sufiĉe reduktita kaj la elspezo por plibonigi la popolan vivon superis la plane difinitan sumon. Tial aperis sufiĉe granda deficiito de financo. En 1980 la ŝtato subtrahis trionon de la investo por la fundamenta konstruado, tamen, ĉar la memstareco de la lokaj aŭtoritatoj kaj la entreprenoj estis grandigita, ili posedis pli da mono kaj pliigis la investon por la fundamenta konstruado, tial la totala sumo de investo restis senŝanĝa. Samtempe ni ne rigore bridis la elspezojn por aliaj flankoj, tial ankoraŭfoje aperis kompare granda deficiito de financo. Por kovri la deficiiton la ŝtato emisiis pli da papermono, sekve la varprezoj dum la lastaj du jaroj iom altigis. Kvankam la tuta popolo, precipe la kamparanoj, enspezis rimarkinde pli multe ol antaŭe, tamen ili malkontentiĝis pro la altigo de prezoj.

Por stabiligi la ekonomion, la ĉina registaro decidis kovri en 1981 la deficiiton, limigi la pa-

por la fondiĝo kaj disvolviĝo de la ĉina Partio kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo, por la venko de la liberiga afero de la diversnaciecaj popoloj de Ĉinio kaj por la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la disvolviĝo de la ĉina socialisma afero. Li ankaŭ faris grandan kontribuon por la emancipiĝo de la subpremataj nacioj en la mondo kaj por la progresema afero de la homaro. Tial la rezolucio montris, ke kvankam li faris gran-



La aŭtoro Xue Muqiao

permonan emision kaj stabiligi la prezojn. Por tio nia registaro alprenis serion da rimedoj, inter kiuj la ĉefa estas redukti 40% de la investo por la fundamenta konstruado (en la pasinteco la investo por la fundamenta konstruado okupis ĉ. 40% de la financa elspezo de Ĉinio. Redukti la investon estas la plej efika rimedo por ekvilibrigi la financan elspezojn), kaj samtempe reduktis la elspezojn por nacidefendo kaj administrado. Ĉijare ni faris rigoran bridon al la investo de la entreprenoj kaj al la pruntedono fare de la bankoj. La plej malfacila problemo estas tiu de la konstruaj projektoj, ekipotaĵoj per fremdlandaj ekipaĵoj-kompletoj. Ĉar la kontraktoj jam estis

dajn erarojn en la kultura revolucio, tamen, taksante lian tutan vivon, liaj meritoj por la ĉina revolucio multe superis liajn erarojn. Liaj meritoj estas en la unua loko, dum liaj eraroj en la dua. Ĝuste pro tio la ĉina popolo ĉiam memoros lin, daŭre persistos en Maozedongpenso, kiu pruviĝis ĝusta post praktikaj provoj, kaj klopodos por konstrui Ĉinion paŝo-postpaŝe en modernan socialisman potencon kun alta demokratio kaj civilizacio.

subskribitaj, kaj revizii ilin estas malfacile. Ekde 1978 la totala investita sumo por importi fremdlandajn ekipaĵo-kompletojn estis 60 miliardoj da juanoj, kiuj estas duoblo de tiu de la kurenta jaro. Se oni senescepte daŭrigus la konstruajn projektojn, aperos du eblecoj: aŭ malvenkos la ekonomia reordigo, kaj dum


la venontaj jaroj la ekonomio ne povos liberigi sin de pasiveco; aŭ oni ĉesigos la plejparton de la enlandaj konstruaj projektoj kaj malordigos la difinitan konstruan planon, kaj tio kaŭzos al la nacia ekonomio plian haoson. Tiuj du rezultoj devas esti laŭeble evititaj. Ĝuste pro tio, Ĉinio nun konsiliĝas kun la kunla-

boraj landoj pri prokrasto aŭ ĉesigo de iuj konstruaj projektoj, aŭ pri alprenado de aliaj bonaj rimedoj por daŭrigi certajn konstruajn projektojn. De ĉiam Ĉinio observas interkonsentojn kaj estas konfidinda kaj neniam evitos sian respondecon.


NOVAJ POLITIKOJ POR LA EKONOMIA DISVOLVIĜO

En la reordigo de la ekonomia strukturo pli grave estas reordigi la proporciajn rilatojn de diversaj branĉoj de la nacia ekonomio, konvene malrapidigi la disvolvigo de la peza industrio, kaj, anstataŭe, multe disvolvi la malpezan industrion kaj agrikulturon. Ĉi-rilate ni jam akiris rimarkindan efikon. Dum la lastaj jaroj dank' al la garantio de la memstareco de produkta taĉmento kaj praktikado de respondeca sistemo de produktado interne de la produkta taĉmento mem, kaj plie, la altigo de la aĉetprezaro de la produktaĵoj de agrikulturo kaj aliaj okupoj, agrikulturo disvolviĝis rapide. En la pasinteco la malpeza industrio disvolviĝis malpli rapide ol la peza industrio, sed en la lastaj du jaroj ĝia rapideco de disvolviĝo superis tiun de la peza industrio. En la pasinta jaro la peza industrio kreskis 1.4%, dume la malpeza industrio 18.4%. Dank' al la rapida kreskado de la produktado de ĉiutagaj bezonaĵoj dum la lastaj du jaroj, kvankam la aĉetpovo multe pliiĝis, tamen la merkata liverado de varoj estis ne tiom streĉa, kiom en la pasinteco. La ĉina ekonomio sin turnas al la direkto plibonigi la popolan vivon kaj harmoniigi la rilatojn inter produktaj rimedoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. La stato ĉiam pliboniĝos.

La Linjiang-a Ilmaŝina Fabriko de Chengdu, kunligita kun aliaj 15 entreprenoj, produktas bonkvalitajn lavmaŝinojn.



Bicikloj produktitaj de la Xi'an-a Bicikla Fabriko




Kompreneble, tio ne signifas, ke ni ne disvolvas la pezan industrion. La diversaj branĉoj de la peza industrio devas aŭ antaŭenmarŝi aŭ retiriĝi laŭ la nunaj cirkonstancoj. Nun Ĉinio ankoraŭ ne povas liveri al si sufiĉe da energio. En la lastaj jaroj, por garantii la planitan jaran produktokvanton ni neglektis esploradon de petrola riĉfonto kaj plivastigon de karbominejoj. Por reĝustigi la malekvilibron en ekspluatado, la produktokvanto ne povas rimarkinde pliiĝi, kio grave influos la disvolviĝon de la tuta ekonomio. La energio-fonto de Ĉinio estas tre riĉa. La nuna jara produktokvanto de karbo estas 600 milionoj da tunoj kaj okupas la trian lokon en la mondo; la jara produktokvanto de nafto estas 100 milionoj da tunoj kaj okupas la naŭan lokon en la mondo. Sed la energia malŝparo en la produktado estas tre granda. Ĉiujare Ĉinio forkonsumas preskaŭ la saman kvanton da energio kiel Japanio, tamen la produktovaloro estas nur kvarono de tiu de Japanio, tial Ĉinio havas tre grandan eblecon por ŝpari energion. Precipe, ĉiujare 40 milionoj da tunoj da petrolo forbrulis kiel hejtajo, tiu kvanto okupas 40% de la totala petrola produktokvanto. Estas granda ankaŭ la malŝparo de karbo. En la venontaj 5-10 jaroj ni devas doni grandan atenton al ŝparo de energio. En la ŝparo de energio ni klopodos por pluapase disvolvi la industriojn. La rezerva kvanto de karbo de Ĉinio estas tre granda. Tiu de petrolo estas ankoraŭ ne tute klare esplorita, sed ĝi estas esperiga. La trafikado de Ĉinio estas streĉa kaj ni devas konstrui fervojojn, havenojn kaj komunikajn liniojn.

Dank' al multfoja novigo de ekipaĵoj, la kvalito kaj kvanto de tekstilaĵoj de la urbo Wuxi atingis la avangardan nivelon de la lando. La foto montras angulon de la laborejo de aerŝpruca teksado de la Ŝpinteksa Fabriko de Wuxi.



La Ĝenerala Kudromaŝina Fabriko de Guiyang grandnombre produktas kudromaŝinojn.



Antaŭ kelkaj jaroj, la meĥanikaj produktaĵoj ne povis kontentigi la bezonon pro grandskala konstruado. Meĥanikaj fabrikoj pliiĝis multe, sed la produktaĵoj estis ne bonaj kaj altprezaj. En la lastaj jaroj ni plurfoje reduktis la investon de konstruado, la meĥanikaj produktaĵoj superis la bezonon kaj multaj fabrikoj devis malpliigi aŭ ĉesigi la produktadon. Antaŭe la produktaĵoj de meĥanikaj produktaĵoj estis planitaj de la ŝtato, la meĥanikaj fabrikoj servis nur por konstrui novajn fabrikojn kaj ne metis en la planon la renovigon de ekipaĵoj kaj teknologio de la malnovaj fabrikoj. Ekde la pasinta jaro la ŝtato alvokis maŝinfabrikojn mem serĉi merkaton por siaj produktaĵoj kaj la lastaj komencis servi al la renovigo de ekipaĵoj kaj tek-

nologio de la malnovaj fabrikoj. Pro konkurenco la kvalito de produktaĵoj estis altigita kaj la prezaro malaltigita. Nun ni kuraĝigas multajn maŝinfabrikojn unuiĝi aŭ reorganiziĝi laŭ la principo de faka kunlaboro kaj postulas, ke ili kreu novan situacion en la venontaj jaroj.

En Ĉinio la malpeza industrio disvolviĝas rapide, sed ĝi ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la merkato. Nun la vivkondiĉoj de la popolo pliboniĝis, kaj la popolo bezonas biciklon, stebmaŝinon, brakhorloĝon, radioricevilon, lavmaŝinon, televidilon, k.a. kiuj ĉiuj pliiĝis respektive je pli ol 30% dum la lastaj du jaroj, sed ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon. Ĉinio havas miliardon da loĝantoj kaj grandan internan

merkaton, tial la produktaĵoj de malpeza industrio havas grandegan debiton.

Kvankam Ĉinio havas 800 milionojn da kamparanoj, tamen la agrikulturaj produktaĵoj ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la enlanda merkato. Tial la plej grava tasko estas rapidigi la disvolviĝon de agrikulturo. Pasinte la agrikulturo disvolviĝis tre malrapide, ĉar ni sufoke bridis la agrikulturon, ke la produkta taĉmento ne havis memstarecon, interne de ĝi ne estis respondeca sistemo, la ŝtato limigis disvolvadon de la neagrikultura produktado kaj tiu de ekonomiaj plantoj kaj malpermesis al la kamparanoj vendi agrikulturajn produktaĵojn en urboj. Dum la lastaj du jaroj ni penis korekti la diritajn erarojn kaj akiris rimarkindan efikon, en multaj lokoj la enspezo de kamparanoj pliiĝis kelkoble. Estas antaŭvideble, ke agrikulturo disvolviĝos rapide, se ni sekvos la diritan vojon kaj disvastigos sciencajn metodojn en terkulturado.

La novaj politikoj por la disvolviĝo de la ĉina ekonomio, por paroli simple, estas ŝanĝi la strukturon de la ĉina ekonomio, laŭ la bezono de plibonigado de la popola vivo. La kresko de produktado povas esti iom malrapida, sed ni devas multe plialtigi la ekonomian efikon de produktado. Por atingi tiun ĉi celon ni devas raciigi ankaŭ la sistemon de la ekonomia administrado, krom ŝanĝi la strukturon de la ekonomio. Pri tiu ĉi flanko mi ne preparolos ĉi-foje.

* La aŭtoro estas veterana esperantisto, konsilisto de la Stata Plana Komisiono de Ĉinio kaj estro de ĝia Ekonomia Instituto.

ZHENG ZHENJIE:

Vojaĝo en grenejo sude de Changjiang-rivero



EN Ĉinio cirkulas la popola diro "Suzhou kaj Hangzhou estas terparadizoj", kiu montras la belon kaj riĉon de tiuj regionoj ĉe la enfluejo de Changjiang (Jangzi)-rivero kaj sur la bordo de la Orienta Ĉina Maro.

En junio kaj julio de la kurlanta jaro, mi havis 4-semajnan viziton al Suzhou, kiu estas unu el la famaj grenejoj de Ĉinio. Tiu regiono kun 380,000 hektaroj da kampoj ampleksas 8 guberniojn inkluzive de Wuxian, Taicang, Changshu, Shazhou, Wuxi kaj Jiangyin. Ekde 1972, la jara hektara produktokvanto de greno ĉiam superis 7.5 tunojn kaj kreskadis senĉese. Tiu de la lasta jaro atingis 10.5 tunojn, kaj tiu de iuj lokoj eĉ superis 15 tunojn.

Vojaĝante en la dense loĝata regiono, mi vidis ambaŭflanke de la vojo tapiŝe etendiĝantajn spikiĝantajn rizkampojn, prosperajn morusbarojn, fruktogardenojn kaj fiŝbasenojn. Ĝi estas vere riĉa loko kiel tiea polkanto priskribas:

*Surkampe rizo oras,
en lag' fiŝar' arĝentas.
Kaj sur la morusbaroj,
kokonoj perle pendas.*

GASTI ĈE KAMPARANO

La unua loko kiun mi intencis viziti estis la produkta brigado Huaxi en la gubernio Jiangyin sude de Changjiang-rivero. Oni diris al mi, ke en la lastaj jaroj la meznombra hektara produktokvanto de greno senescepte superis 15 tunojn, kaj preskaŭ ĉiu kamparana familio havas rezervitan grenon sufiĉan por unu aŭ duona jaro. En komparo kun aliaj lokoj de nia kamparo, Huaxi estas tre riĉa kaj estas alloga por vizitantoj.

Estis tago en pluvoza sezono. Matene, je la sepa kiam mi ekveturis de Suzhou, la antikva ĝardeno urbo, en la ĉielo ŝvebis nur gazaj nuboj. Oni atentigis min, ke baldaŭ pluvegos, sed mi tute ne kredis. Post ĉ. 2 horoj, subite ekpluvegis, kvazaŭ la akvo estus verŝata per sitejoj. Rigardante eksteren tra la aŭtofenestro, mi vidis, ke la kampoj fariĝis pli verdaj en la pluvego, riveroj kradigis la kampojn, boatoj fiŝkaptantaj punktis la riverojn, velŝipoj glitis ĉe la horizonto, kaj kamparanoj en pluvmantelo pene laboris. Ambaŭflanke de la ŝoseo bonorde viciĝas kamparanaĵoj domoj kun blankaj

muroj kaj ruĝa tegmento, kaŝiĝantaj en verdaj bambuaroj kaj salikaroj, antaŭ la domoj kokerikas kokoj kaj naĝas anasoj. Kiel rava pejzaĝo en pluvo sude de Changjiang-rivero!

Kiam la aŭto atingis la gubernion Shazhou, subite venis al mi la ideo unue viziti ĝin — kompare postiĝintan lokon. Sed ekster mia supozo, kiam mi venis al la vilaĝo Ouqiao kaj gastis ĉe la maljuna kamparano Li Zusheng, min trafis dubo, ĉu mi troviĝas en la realo.

Kiam mi atingis la vilaĝon, la 64-jara Li estis sarkanta en la kampo. Gvidanto de la produkta brigado Qian Kuizhong kondukis min en la domon de lia pliaĝa filo Li Zhenhua. La domo troviĝas en domvico duonkilometron longa. Ĝi estas vasta, kaj tre konvena por kamparanoj. Antaŭ la domo estas parcelo por privata uzo, kie Li kulturas legomojn k.s. La teretaĝo estas uzata por kuirejo kaj konservejo, kaj la ŝtuparo lokiĝas en la mezo.

En la dua etaĝo mi renkontis Zhang Yubao, la edzino de Li Zhenhua. Komence ŝi estis iom hontema, sed post nelonge ŝi alkiutimiĝis kaj varme akceptis min. Ŝi diris, ke ŝi estas instruistino de elementa lernejo subvenciata de la kolektivo. (En Ĉinio, precipe en la kamparo, plejparto de la lernejoj estas subvenciata de la ŝtato, dum la ceteraj de kolektivo — Trad.) Ĉiumonate ŝi estas salajrata je 110 juanoj (1 juano egalas 0.683 usonan dolaron), t.e. la plej alta nivelo por la komunumanoj. Ŝia edzo Li Zhenhua estas masonisto de la konstrua taĉmento de la brigado. Ŝiaj 12-jara filino kaj 9-jara filo vizitas elementan lernejon. Kune

kun ŝi loĝas ŝiaj bogepatroj, du bofratoj, edzino de unu el la bofratoj kaj unu nevo.

En ilia familio sume estas dek homoj, ĉiuj estas komunumanoj. Mi okulmezuris kaj trovis, ke ilia domo havas areon de pli ol 200 kvadrataj metroj. Kaj en la vilaĝo pli ol duono de la komunumanoj loĝas en tiel vasta domo, t.e. ĉiu persono okupas meznombro 22.8 kvadratajn metrojn. Ŝi diris kontente: “Kredeble en Beijing vi ne havas tiel vastan loĝejon.”


Mi estis kondukita en ilian dormoĉambron, kiu estis meblita per lito, spegul-ŝranko, skribotablo, kvadrata manĝotablo, komodo, kestoj kaj seĝoj. La meblaro estas tute nova, brile lakita. Ŝi diris, ke en la lastaj jaroj, pro altiĝo de la enspezo, ili aĉetis sofion, stebmaŝinon, radioricevilon, elektran ventumilon, biciklon, tablan horloĝon kaj brakhorloĝojn. Antaŭ nelonge ili aĉetis ankaŭ televidilon.

La mastrino sidigis nin kaj prezentis al ni teon, bombonojn kaj arakidnuksojn, kaj poste iris prepari vespermanĝon.

Vespere la tuta familio revenis. La gastigantoj invitis min al vespermanĝo. La abunda menuo konsistis el fiŝo, salikoko, krabo, anaso, porkaĵo kaj legomoj. La mastro grumblis kontraŭ Qian, ke li ne anticipis anoncis mian alvenon, ĉar alie ili povus fari la manĝon pli abunda.

Laŭ la reguloj de la brigado, gemaljunuloj kun aĝo de pli ol 60 jaroj povas ricevi de la brigado ĉiujare po 90 juanojn kiel pension. Sed la geedzoj de Li Zusheng tute ne volis resti senlabore. Avo Li diris, ke lia maljuna edzino, 62-jara, laboras en kokonelbobenejo de la brigado, lia dua filo estas brigadestro kaj ties edzino estas lerta trikistino, lia tria filo estas laboristo. La granda parto de la enspezo de la familio venas de laborpontoj, kaj ankaŭ la enspezo de neagrrikulturaj okupoj pligrandiĝas jaro post jaro. En 1980 la tuta familio enspezis 6,722 juanojn, t.e. dekoblo de la enspezo de 1976. Kaj laŭ onidiro ilia enspezo estas nur iom super la meza nivelo en la brigado. En la pasinta jaro, la plej alta monata

Rizkampo de la Xitang-a Produkta Brigado



enspezo por viro de la brigado superis 120 juanojn. La totala enspezo de la brigado estis 3,360, 000 juanoj, kaj meznombro ĉiu membro de la brigado enspezis 1,750 juanojn.

Post la vespermanĝo iuj el la familianoj televidis. La geavoj amuzis la nepon, ridetante kun kontento. Zhang Yubao korektadis la ekzercojn de lernantoj. Kelkaj membroj de la familio iris al teatroj.

Kiam mi kaj Qian Kuizhong adiaŭis la mastrojn, la horloĝo jam batis la dekan. Mi ja ne povis iri plu al Huaxi-brigado.

PRI KIO MI ESTIS INFORMITA EN QIANZHOU-KOMUNUMUMO

Suzhou produktas tre bonkvulitan rizon, kaj pro tio famiĝis tra la tuta lando. Antaŭtagmeze de la 2-a de julio, mi ekveturis de la urbo Wuxi kaj post duonhoru mi atingis la komunumon Qianzhou, kiu situas nordokcidente de ĝi. La komunumo havas terenon de 35 kvadrataj kilometroj kaj 36,000 homojn. La ĉefa okupo de la komunumo

estas rizkulturado, kaj cetere ĝi produktas ankaŭ agrikulturajn maŝinojn, cementon, ŝipojn, ŝtoftinkturajn maŝinojn, brodaĵojn, brikojn, tegolojn k.a.

La oficejo de la komunumo kaj la ĉefaj institucioj de publikaj servoj troviĝas en la urbeto Qianzhou. Ĉe la T-formaj stratoj viciĝas ĉiovendejo, almanĝaĵejo, kinejo, poŝtejo, banko, gastejo, apoteko, librejo, fotejo kaj banejo. Ne malproksime de la strato estas korto, en kiu troviĝas du blankaj etaĝdomoj ĉirkaŭataj de floroj. Tio estas la sidejo de la administracio de la komunumo. La gvida organo de la komunumo konsistas el la KPĈ-a komitato kaj la administra komitato. La partia komitato estas elektita de la pli ol 800 komunistoj, kaj la administra komitato (ĝi estas ankaŭ loka registaro) estas elektita de la popola kongreso de la komunumo.


La partia komitato de la komunumo konsistas el 1 sekretario, 5 vicsekretarioj kaj 8 komitatanoj. La partia komitato observas la principon "kolekti-

va gvidado kaj individua respondec". La administra komitato havas prezidanton kumulatan de la sekretario de la partia komitato. Ĝiaj 4 vicprezidantoj kaj 9 komitatanoj respondas respektive pri agrikulturo, industrio, neagrikulturaj okupoj, kulturo, edukado, kaj direktas la laborojn de la Virina Federacio kaj aliaj. La tuta komunumo konsistas el 21 produktaj brigadoj el 241 produktaj taĉmentoj. Nun oni ankoraŭ observas la principon de trinivela administrado. La produkta taĉmento estas baza unuo sendependa en financo. Ĉiu taĉmento havas 20-30 familiojn. La taĉmento rekte organizas la agrikulturan kaj neagrikulturajn laborojn, decidas la dividon de la enspezoj kaj aranĝas la vivon de la komunumanoj. La produkta taĉmento estas malgranda, tial ĝi ne havas fortojn por funkciigi industrion, kaj industrio estas prizorgata de produkta brigado kaj komunumo.

Posttagmeze de la sama tago mi renkontiĝis kun sekretario Qin Jiahong de la komunumo. Sunbruna, forta, li montriĝis energioplena. Demandite de mi pri sia laboro kaj vivo, li respondis kun rideto: "Ĉiumatene mi ellitiĝas frue je la ekkrepuskiĝo kaj tuj iras promeni en la proksimaj kampoj. Ĉirkaŭ la sepa mi revenas por matenmanĝo. Poste estas mallonga paŭzo kaj tiam mi akvumas la florojn kaj arbojn en la korto. Je la oka mi komencas labori."


Qin loĝas sola en la komunumo kaj lia familio estas en la urbo Wuxi. En sia aĝo de 12 jaroj li fariĝis lernoservisto en iu Shanghai-a butikoj de kotonaj ŝtofoj. Nun li estas oficisto salajrata de la ŝtato. Ĉiumonate

Kulturado de perlokonkoj



li lukras 74 juanojn. Li vestas sin mallukse, kiel ordinara laboristo. Teknikisto Ma Shining de la komunumo diris al mi, ke Qin ne ofte hejmenrevenas. Nur kiam li ĉeestas kunvenon en la urbo, li pasigas kelkajn tagojn en sia hejmo. Generale li loĝas en la komunumo kaj manĝas en la komuna manĝejo same kiel aliaj laborantoj de la komunuma institucio.

En akompano de Ma mi rigardis kampojn de la brigado Xitang. Bonege kreskis la rizo, kaj la rizkampoj glate sterniĝis kiel tapiŝo. "Eble tiuj parceloj estas por eksperimento? Mi ja volus rigardi la ordinarajn kampojn." Miaj vortoj mirigis Ma: "Ĉiuj tiuj kampoj estas ordinaraj. Kaj ĉiuj kampoj de pli ol 110 hektaroj de la brigado estas tiaj." Ni promenis sur la kampopadoj kvazaŭ sur verda tapiŝo. Ma detale konigis al mi la staton de la komunumo Qianzhou: La loko estis malalta kaj ofte suferis de inundo kaj akvogstagnado. En la 20 jaroj de 1950 ĝis 1970, la loko estis kvarfoje inundita kaj la hektara produktokvanto de greno vagadis ĉirkaŭ 6 tunoj. Ekde 1970, la komunumo konstruis en malalta loko digon kun longeco de 19 kilometroj, samniveligis la kampojn kaj fosis kanaletojn inter la kampoj. Oni fosis kanaletojn norden-direktajn kun interspaco de 1,400 metroj kaj branĉajn kanaletojn orienten-direktajn kun interspaco de 200 metroj. Kaj en la lastaj 10 jaroj oni fosis 92 kanaletojn, konstruis 237 arkajn pontojn, fosis subterajn kanaletojn kun longeco de 74 kilometroj kaj starigis pli ol 100 elektrajn drenajn pumpstaciojn. Dank' al tiuj aranĝoj la pluvakvo de taga atmosfera precipitaĵo de



Kovado de fiŝoj

200 mililitroj povas esti fordrenita en 2-3 tagoj. En 1980 la tuta regiono de Suzhou estis damaĝita de katastrofo, sed la meznombra hektara produktokvanto de greno de la brigado Xitang ankoraŭ superis 11.2 tunojn.

Same kiel aliaj lokoj de la regiono, ankaŭ Xitang bredas bombiksojn krom kulturi rizon. La tieaj morusarboj estas nur unu metron altaj, sed la frondoj longas 1-2 metrojn, kaj la folioj estas grandaj kiel ventumilo.

"Ĉu la etaĝdomo en la foro estas oficejo de la brigado?" mi demandis.

"Ne, ĝi estas bombiksobredejo de Xitang."

Kun granda scivolemo mi iris en la bombiksobredejon. Tie bonorde viciĝas etaĝeroj 7-8-bretaj. Sur ĉiu breto estas granda ronda bambua plat-korbo. Mi vidis en la korboj silkvermojn fadendikajn.

"Kiel malgrandaj estas ili!" mi miris.

"Nun ili ja estas malgrandaj, sed, sufiĉe nutrate per morusfolioj, ili baldaŭ grandiĝos."

La silkvermoj estas tre delikataj, tamen la junaj bredistinoj de la brigado povas kreskigi bombiksojn 3-4-foje de aprilo ĝis decembro.

En akompano de Ma Shining, mi rigardis la oficejon kaj infanvartejon de la brigado, loĝdomojn de komunumanoj, teksmanan fabrikan, duonmeĥanizitan porkobredejon kaj etaĝan kokobredejon. La brigado estas riĉa, kaj la komunumanoj povas ĝui senpage kuracon, banadon, rigardon de filmoj, tajloran kaj barbيران servon, kaj prilaboradon de grenoj, kaj iliaj infanoj povas senpage viziti la lernejon aŭ infanvartejon.

FIŜOJ VIVANTAJ EN ETAĜOJ

En la regiono de Suzhou ŝipo estas tre grava trafikilo. Tie la riveroj rete interkruĉiĝas kiel stratoj en la urboj. Tie oni bre-

das fiŝojn de miloj da jaroj. La nigra kaj blanka karmo, tinko k.a. estas tre ŝatataj de la popolo.

Per ligna ŝipo, mi veturis al la brigado Zhangcun de Likou-komunumo de Wuxian-gubernio.

En Zhangcun mi faris vizitadon gvidate de Lu Ernan, forta viro, estro de la fiŝbreda grupo. Starante sur iu arkponto, mi vidis antaŭ mi multajn basenojn, kun totala areo de ĉ. 50 hektaroj. La basenoj estas bonorde borderitaj per morusarboj, mandarinarboj kaj persikarboj.

Mi proksimiĝis al iu baseno. La surfaco trembrilis sub la suno, kaj senĉese elsaltis fiŝoj. Oni ekipis la basenon per aer-pumpiloj. Ĉe la basena rando staras ligna tabulo, sur kiu estas skribita: AREO: 50 MUOJ (15 muoj egalas 1 hektaron), NORMO DE PRODUKTOKVANTO: 750 KG. PO MUO. En la basenoj oni bredas nigrajn kaj blankajn karmojn, tinkon, karason kaj multajn aliajn specojn. Mi demandis kun miro:

“Ĉu la malsamspecaj fiŝoj ne interbatalas kaj konkuras en kapto de manĝaĵo?”

Lu respondis sprite: “Estu trankvila. La fiŝoj vivas en la akvo kiel homoj en etaĝdomo. Iuj specoj ŝatas vivi supre, kaj aliaj profunde. Ili vivas en harmonio kaj racie dividas inter si la manĝaĵon: Iuj specoj ŝatas herbojn, aliaj bukencojn, triaj algojn kaj kvaraj planktonojn.”

Antaŭtagmeze Lu Ernan invitis min rigardi ilian eksperimentejon de arta kovado de frajo. Li diris, ke antaŭe la tieaj loĝantoj opiniis, ke fiŝoj en baseno ne povas fraĵi, kaj pro tio ili devigite longe vojaĝis por aĉeti fiŝi-

dojn en Wuhan, Anqing aŭ Jiujiang. La kosto por transportado de fiŝidoj estis tre alta. Kaj cetere, la fiŝidoj vivantaj en natura rivero, ne povas rapide alkutimiĝi al la nova medio kaj bone kreski. Poste, ili aplikis metodon injekti pituitrinon al fiŝoj, por ke la fiŝoj ellasu frajon kaj impregnu ĝin. Kaj fakte preskaŭ la tuto de frajo estis elkovita. En 1980 la brigado kaptis 300 tunojn da fiŝoj, kiuj kostis 550,000 juanojn, kaj el tio ĉiu membro de la brigado meznombre enspezis 300 juanojn.

Prospero de fiŝbredado en la kamparo multe vigligis la foirojn. Mi plurfoje promenis en foiroj kaj vidis, ke multaj kamparanoj estas tie vendantaj freŝajn salikokojn, fiŝojn, legomojn k.a.

LA KAŬZOJ DE LA RIĈAJ RIKOLTOJ

La kaŭzoj estas facile troveblaj. Ekzemple, veturante en la regiono, mi vidis, ke ĉie kuniras kun la vojo alttensia lineo, kaj ĉie troviĝas elektraj pumpejoj. Multaj lokoj de la regiono aplikis modernan teknikon en agrikulturo, starigis reton de agromonia esplorado, faras grandskalan sciencan esploradon kaj eksperimentadon pri agrikulturaj maŝinoj, insekticidoj, kemisterkoj, speciselektado, kulturado, protektado de plantoj kaj plugsistemo, kaj akiris ĝojigajn sukcesojn.

Kiam mi vizitis en la unua brigado de la komunumo Yuexi situanta tuj apud la lago Taihu, la vicsekretario de la partia filio de la brigado Cai Muquan konigis al mi, ke antaŭe, en tre okupata sezono, la tieaj komunumanoj devis labori ĉiutage 15-16


horojn, kaj krome la virinoj estis ŝarĝitaj de tre peza dommas-trumado. Ekde 1970 la brigado aĉetis sume 458 diversajn agrikulturajn maŝinojn por mekani-zi la agrikulturon, kies totalaj ĉevalpovoj atingis preskaŭ 1,000. Krome oni konstruis 3 elektrajn pumpejojn, 6.6 hektarojn da dis-ŝprucige irigaciaj kampoj, 1 elektrejon movatan per metano, kaj 1 rizidokulturejon kiu povas liveri rizidojn sufiĉajn por 100 hektaroj da kampoj. Dank' al la supre menciitaj rimedoj la laborintenseco de la komunumanoj estis multe malgrandigita. La meznombra hektara produktokvanto de rizo en 1980 kreskis de 10 tunoj ĝis 14 tunoj kompare kun tio antaŭ 10 jaroj. Ĉisomere regis sekeco, sed la produktokvanto de tritiko, hordeo kaj aveno ankoraŭ superis 4.5 tunojn. La kolektiva akumulo de la brigado kreskis de 31,000 juanoj en 1970 ĝis 1,170,000 juanoj en 1980, kaj la meznombra jara grenporcio por ĉiu brigadano atingis 350 kg.

Ĉio ĉi tio rimarkigis, ke en la lastaj 30 jaroj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ege ŝanĝiĝis la loko. Mi sciigis de maljunaj kamparanoj, ke la fekunda regiono Suzhou antaŭe ofte estis minacata de sekeco kaj inundo. Dum 300 jaroj okazis entute 200 naturaj katastrofoj. Sed nun la regiono estas protektata de kompleta irigacia sistemo kiu povas rezisti inundon, akvostagnadon, sekecon kaj trohumidecon. En la gubernio Kunshan mi vidis malaltejon de 400 hektaroj ĉirkaŭatan per digo. Aliflanke de la digo estas ondanta lago Yangcheng. En la gubernio Shazhou mi rigardis la digon de Changjiang-rivero. La digo riparita, larĝigita kaj altigita, similas al la Granda Muro.

Sukcesoj en la fundamenta konstruado de kampoj sendube estas unu el la bazaj kaŭzoj de la riĉaj rikoltoj de greno. Sed la kadroj kaj komunumanoj, kiujn mi intervjuis, ĉiuj opinias, ke la bonaj rikoltoj dependas ankaŭ de la novaj efikaj rimedoj aplikataj de la popola registaro en la lastaj jaroj, kiuj senprecedence stimulis la aktivecon de la kamparanoj en la produktado. Kiujn rimedojn do oni alprenis?

1. STABILIGI POSEDSISTEMON. En la fino de la kvindekaj jaroj la popola komunumo en la ĉina kamparo praktikis la sistemon de “trinivela (produkta taĉmento, produkta brigado kaj komunumo) posedanteco kun taĉmento kiel la bazo”, kio estis konforma al la tiama nivelo de disvolviĝo de la agrikultura produktivo. Sed en la pasinteco, oni faris maldekstrajn erarojn en la gvido al la agrikulturo, kaj la regiono de Suzhou, kiel aliaj lokoj de la lando, facilanime ŝanĝis la produktajn rilatojn kaj unuigis produktajn brigadojn aŭ komunumojn, kiuj enspezis malsame, samniveligis la enspezojn de la komunumanoj, kio damaĝis ilian aktivecon en produktado. Lastatempe la eraroj estis korektitaj.

2. GRANDIGI LA DECIDRAJTON DE LA PRODUKTA TAĈMENTO. Antaŭe la instancoj tro multe entrudiĝis en la aranĝon de produktado de la produktaj grupoj kaj faris multajn katenajn regulojn, rezulte de kio la specoj de produktaĵoj de la grupoj estis malmultaj. En la lastaj jaroj la stato estis radikale ŝanĝita. La produktaj taĉmentoj estas permesitaj fari pli da decidoj en produktado, administrado kaj dividado, povas disvolvi fiŝbredadon, neagrikul-



La oficejo de la komunumo Qianzhou

turajn okupojn kaj brutobredadon laŭ la realaj kondiĉoj de sia loko. Ekzemple, antaŭ 3 jaroj, superaj instancoj decidis, ke la regiono Suzhou laŭeble multigu 3-rikoltajn (nome en sama kampoj oni kulturas en unu jaro dufoje rizon kaj unufoje tritikon) kampojn, pro kio oni devis fari longtempan prizorgadon al la plantaĵoj, elspezis multe, sed rikoltis malmulte. La kadroj kaj komunumanoj estis tre malkontentaj pri tio. Nun la taĉmentoj povas laŭkondiĉe decidi pri sia produkto, kaj plejparto de la produktaj taĉmentoj de Suzhou flankenpuŝis la “tri-rikoltan sistemon.”

3. ALTIGI LA AĈETPREZOJN DE 18 SPECJ DE ĈEFAJ AGRIKULTURAJ PRODUKTAĴOJ. La altigo de la aĉetprezoj decidita de la Ŝtata Konsilantaro rimarkinde multigis la enspezon de la kamparanoj (la aĉetprezoj de la 18 specoj de ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj estis altigitaj je 25.8%).


4. STARIGI TAŬGAN PRODUKTAN RESPONDECAN SISTEMON. Dum multaj

jaroj iuj lokoj de la regiono kritikis la principon “al ĉiu laŭ laboro” kiel kapitalisman tendencon, kaj ne distingis bonajn laborulojn de la malbonaj. Dum mia vizitado, multaj kamparanoj grumblis antaŭ mi, ke antaŭe “oni manĝis egale el la sama poto sen distingo de kontribuo, ke oni svarmis en la kampoj nur por staradi senfare”. Lastatempe la produktaj taĉmentoj dividis sin en kelkajn laborgrupetojn. Premise ke la semotremado, rizidozorgado, plugado, irigaciado, insektoekstermado, falĉado, grenosunumado kaj entenejigado estas farataj kolektive, la ceteraj laboroj, ekzemple, sarkado, maldensigado de plantaĵoj, aldonado de sterkaĵoj k. s., estas asignitaj al personoj aŭ laborgrupetoj, kiuj respondecas la laborojn. La novaj metodoj rikoltis bonan efikon.

Cetere, oni kuraĝigas la komunumanojn okupiĝi pri hejmaj metioj, permesas liberan foiron, donas al la kamparanoj terparcelon por privata uzo, kio multe stimulis la disvolviĝon de la agrikulturo de la regiono.


La baraja rigardata de alte







Kontrolo antaŭ elektrodonado

Gvidejo de la ŝipkluzoj



Projektantoj de la barajo





Inundego fluas tra la akvoellasaj kluzoj.

NOMBRO DA GRAVAJ KONSTRUAJ TASKOJ DE ĈINIO PLENUMITA

En la kuranta jaro, nombro da gravaj konstruaj taskoj de la ĉinaj energia, malpeza kaj tekstila industrioj estas plenumita. En la unua duonjaro 10 grandaj kaj mezgrandaj sintezaj konstruaĵoj kaj 10 unuopaj konstruaĵoj estas starigitaj kaj transdonitaj al produktado.

Ekz. la nove konstruitaj ŝaktoj povas produkti 1,950,000 tunojn da karbo; la 5 novaj grandaj kaj mezgrandaj elektrejoj havas kapaciton de pli ol 460,000 kilovattoj; la petrol-industria branĉo plenumis pli ol 50% de la jara planita putbora tasko kaj la novaj petrolkampoj produktis 1,326,000 tunojn da nafto.

En la unua duonjaro ĉijare la malpeza kaj tekstila industrioj atingis novajn sukcesojn. Ekz. en ŝpinteksejoj plimultiĝis 69,300 novaj spindeloj; oni finkonstruis sep sukerfabrikojn kun produktokvanto de 41,000 tunoj; kaj du novaj petrolaj kemifibraĵoj jam komencis prove produkti.

AĈETA TASKO DE SOMERAJ GRENOJ SUPERPLENUMITA

Malgraŭ reduktiĝo de la prise-mita areo de someraj grenoj kaj

Multaj kaj multaj gejunuloj laboris sindoneme por pli frue finkonstrui la akvoutiligan pivotan konstruaĵon de Gezhouba.

La akvoutiliga pivota konstruaĵo de Gezhouba estas frukto ankaŭ de la tutlanda kunlaborado. Pli ol 120 unuoj de nia lando partoprenis en la planado, projektado kaj konstruado de la

serioza sekegeco, la 14 ĉinaj provincoj kaj municipoj kiuj ĉefe produktas somerajn grenojn, ree akiris bonan rikolton. Ĝis la 25-a de julio la aĉeta kvanto de someraj grenoj staplitaj atingis 9,600 milionojn da kilogramoj, t.e. je 3% super la plano.

ĈINIO HAVAS FERVOJOJN DE PLI OL 50,000 KM.

Laŭ lastatempa statistiko, de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia lando konstruis 103 fervojojn trunkajn kaj branĉajn kun totala longeco je 29,000 kilometroj. Nun la totala longeco de la funkciantaj fervojoj superas 50,000 kilometrojn. En la malnova Ĉinio plejparto de la fervojoj kuŝis en la nordorienta parto de Ĉinio kaj ĝiaj orientaj marbordaj provincoj. Nun tia neracia aranĝo jam estas fundamente reformita. Escepte de Tibeto, la fervoja reto en la tuta lando jam unuapase formiĝis.

ĈINIO POSEDAS PLI OL 400 OCEANAĴN VARŜIPOJN

Dank' al la aktiva disvolvo de oceana trafiko nun Ĉinio jam havas pli ol 400 oceanajn varŝipojn kun kapacito de ĉ. 8 milionoj da toneloj. La jara transporta kvanto superis 40 milionojn da tunoj.

La oceanaj naviglinioj de Ĉinio iom post iom multiĝas. En 1961, la ĉinaj varŝipoj atingis nur dekkelkajn havenojn de 7 landoj kaj regionoj, sed nun jam pli ol 420 havenojn de pli ol 100 landoj kaj regionoj. Nun jam estis starigitaj

hidroelektrejo. Okazis pli ol 100 kunvenoj de specialistoj el diversaj lokoj de Ĉinio. Escepte de Taiwan-provinco, ĉiuj aliaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando liveris materialojn kaj fabriki ekipaĵojn por la baraĵo Gezhouba.

La plenumiĝo de la unua perioda konstruado de la akvo-

la periodaj naviglinioj de Ĉinio ĝis Koreio, Hongkong, Japanio, la Sudorienta Azio, la Persa Golfo, la Ruĝa Maro, Afriko, Mediteraneo, Eŭropo, Ameriko, Oceanio, Usono, Kanado k.a. Oni ankaŭ starigis februare ĉijare ĉinan-usonon periodan naviglinion por konteneraj varŝipoj, krom la ĉina-aŭstralia kaj ĉina-novzelanda.

La ĉina oceana ŝiparo havas diversstipajn ŝipojn, kiel ŝipoj rulŝarĝa, kontenera, fridiga kaj multuza, la ŝipoj por diversaj varoj, por greno aŭ erco, petrolŝipo, ŝipoj por ligno kaj pasaĝeroj. Sur ili laboras bone trejnitaj ŝipanoj kaj spertaj stiristoj.

RIMARKINDAJ SUKCESOJ EN AKVOUTILIGA KAJ HIDROELEKTRA KONSTRUADO


En la 32 jaroj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia lando dragis drenajn kanalojn, riparis kaj nove konstruis digojn de ĉ. 160,000 kilometroj, konstruis pli ol 86,000 akvorezervejojn kaj 6,400,000 akvobaraĵojn. La movforto de elektra irigacio kaj dreno atingis 70 milionojn da ĉevalpovoj, la maŝinputoj nombriĝas je 2,200,000, la irigaciata areo superis 700 milionojn da muoj (1 muo = 1/15 hektaro). Pli ol 200 milionoj da muoj da ofte inundataj kampoj kaj ĉ. 50 milionoj da salalkalaj kampoj estas reformitaj. La totala kapacito de hidroelektrejoj atingis ĉ. 20 milionojn da kilovattoj, inter kiuj pli ol 6 milionoj da kilovattoj estas produktitaj de malgrandaj elektrejoj.

utiliga pivota konstruaĵo de Gezhouba altiris atenton de nemalmultaj famaj personoj de la mondo, el kiuj iu laŭdis: "La baraĵo Gezhouba estas sukcesa kaj okupas lokon en la mondo," kaj alia diris: "Ĉinoj kapablas konstrui kian ajn grandan baraĵon, kiun ili volas, inkluzive de la konstruaĵo ĉe la Tri Montgorgoj."



DUOBLAĴOJ EN
ESPERANTO

de MIKELO RIZO



La aŭtoro Mikelo Rizo

LA granda parto de la Esperanta vortaro devenas de la hindeŭropa familio. Multaj vortoj en la originala lingvo havas pli ol du sencojn. Ekzemple, ambaŭ angla "letter", franca "lettre" devenas el la latina vorto "littera", kaj havas du ĉefajn sencojn. Oni iomete modifas la formojn de la vortoj de tiu ĉi tipo en Esperanto por ke unu formo esprimu unu sencon, alia formo esprimu alian sencon, tiamaniere estas evitataj malklareco, miskompreno kaj konservita la simileco de la vortoj kaj la interna interligite-

co de iliaj sencoj (ekz. letero, litero). Tiu, kiu komprenas la anglan, francan aŭ aliajn eŭropajn lingvojn, trovas tiujn vortojn familiaraj kaj facilaj por memori. Ni nomas tiujn parajn vortojn etimologiaj duoblaĵoj aŭ ĝemelaj vortoj.

Estas alia grupo da vortoj. Iu vorto havas unu ĉefan sencon en unu el la originaj eŭropaj lingvoj. Ekzemple, angla "drink" kaj germana "trinken" ambaŭ devenas el la antikva germana familio kaj la senco estas "enbuŝigi kaj gluti (likvaĵon)". Esperanto, preninte la germanan formon, kreis "trinki", kaj, preninte la anglan formon, kreis "drinki".


La tria. Iu vorto en unu nuntempa eŭropa lingvo (ekzemple, franca "produit") havas du ĉefajn sencojn: 1. produkto, 2. produto; en alia eŭropa lingvo de la sama familio havas du samajn sencojn (ekzemple, angla "product", germana "Produkt"). Esperanto modifis la francan formon por signifi "produkon", kaj prenis la germanan kaj anglan formon por signifi "produkton". Tio estas scienca kaj racia divido.

La kvara. La senco kaj la formo de iu Esperanta vorto estas simila al vorto prenita el eŭropaj lingvoj, kaj havas la saman radikon. Ekz., Esperanto: stu-

danto (lernanto, participo de "studi"): tiu, kiu studas; studento prenita el angla, germana "Student"): persono, studanta en universitato aŭ alia supera lernejo. Ilia komuna radiko estas "stud-". Prezidanto (estro de iu organizo, societo aŭ respubliko, participo de "prezidi"); prezidento (estro de ŝtato, prenita el la franca, angla aŭ aliaj lingvoj. Ilia komuna radiko estas "prezid-" deveninta de la latina vorto praesidere).

La kvina. Iu vorto en iu origina eŭropa lingvo havas pli ol tri sencojn kaj interligitajn kaj diferencajn. Esperanto prenas ĝin kaj ŝanĝetas ĝin en plurajn formojn por ke unu formo havu nur unu ĉefan sencon. Tiamaniere la miskompreno estas evitata kaj klareco estas atingata. Ekz.:

franca	sens
angla	sense
Esp-a	senco (de vorto, frazo)
	senco (sentumo)
	sento (percepto)
franca	ordre
angla	order
germana	Ordnung
	Orden
	Order
Esp-a	ordo (vico)
	ordeno (signo)
	ordono (estra volo)



Aŭstralia esperantistino s-ino Margaret Chaldecott en legado de la artikolo

Rim. Hotel (hotelo), hostel (gastejo), hospital (hospitalo) en la angla lingvo estas konsiderataj kiel etimologiaj trioblaĵoj, ĉar ilia komuna origina radikilo estas la latina vorto "hospes (gasto)". Sed ni ne konsideras tiujn vortojn kiel etimologiajn duoblaĵojn en Esperanto. Ni povas simple rigardi "hotelon" prenita el angla "hotel", aŭ franca "hôtel", kaj "hospitalon" prenita el angla "hospital". Ĉar Esperanto, kiel la nuntempa internacia helpa lingvo, prenas vortojn grandparte el la vivantaj lingvoj de la latina lingva familio (la franca, itala, hispana, portugala k.a.), malgrandparte el la vivantaj lingvoj de la ĝermana lingva familio (ekz. la angla, germana...). Nur en malmultaj okazoj oni prenas la vortojn el la morta latina lingvo. La sciencaj terminoj (ekz. zoologiaj, botanikaj, mineralaj, anatomiaj vortoj) estas prenita el la latina lingvo, por la internacieco kaj koncizeco.

Ni ne konsideras la vortojn "kemio" kaj "ĥemio", "Ĉinio" kaj "Ĉinujo" kiel etimologiajn duoblaĵojn, ĉar ili estas nur variantoj de la sama vorto.

La tri karakterizaĵoj de la etimologiaj duoblaĵoj: la komuna origino, la simileco en formo kaj la diferenco de sencoj interligitaj unu kun alia.

La formado de etimologiaj duoblaĵoj estas jenaj:

1. Infleksio (fleksio per modifado de vokalo, interne de la radikilo de vorto): a-e, a-o, o-u, o-c:

banko (financa institucio)
benko (por sidi)
damaĝi (difekti)
domaĝi (timi bedaŭrindaĵon)
fronto (antaŭa parto de io)

frunto (vizaĝparto)
koro (organo)
kero (ludkartoj)

2. e-s (La vortoj de "e" estas prenita el la franca lingvo, la vortoj de "s" estas prenita el la lingvo germana aŭ angla.):

eŝafodo skafaldo
etato stato ŝtato
etudo studo

3. Modifado de konsonantoj.

b-v	rabi	ravi
c-ĉ	cifero	ĉifero
c-k	implici	impliki
c-ks	indico	indekso
c-s-t	senco	senso
		sento
c-z	kruco	krozi
ĉ-k	ĉanto	kanto
ĉ-ŝ	ĉamo	ŝamo
ĉ-z	skeĉo	skizo
d-t	drinki	trinki
d-s	respondi	responsi
f-p	funto	pundo
g-k	agordi	akordi
ĝ-j	ĝusta	justa
j-j	jako	ĵaketo
p-v	nepo	nevo
s-ŝ	pasi	paŝi
s-z	intereso	interezo
s-t	kompromisi	kompromiti
t-z	kanto	kanzono
t-ŝ	tapeto	tapiŝo

4. Forfalo de litero "v" el la konsonantaj grupoj "kv, gv".

kv-k biskvito biskoto
gv-g lingvo lango

5. Intermeto de vokaloj "o,u,e" aŭ aliaj vokaloj inter konsolanto 1(r) kaj alia konsonanto.

nobla nobela
artiklo artikolo

6. Forfalo de litero "l" el la konsonantaj grupoj (konsonanto + l).

buklo buko
artiklo artiklo

7. Iometo modifado de finiĝoj.
por pro
prokuristo prokuroro
glacia glacea
oferi oferti


8. La formo A estas prenita el unu lingvo, la formo B estas prenita el alia. Tamen ili devenis el sama origino. Ekzemple, karbo (lat.) — karbono (f.); trifolio (lat., angl.) — trefo (germ., rus.); ordo (f., angl.) — ordeno (germ., rus.); poento (f., angl.) — punkto (lat., germ.), punto (ital., his.).

Fine, estas rimarkinde ke iatempe iu grupo da etimologiaj duoblaĵoj enhavas ne nur tian modifon de sono, sed ankaŭ alispecan modifon de sono, ekz., "damaĝi" — "domaĝi", kiuj povas esti rigardataj al l-a (Infleksio) kaj ankaŭ al la 8-a: damaĝi (angl. damage), domaĝi (f., dommage). Same estas la vortgrupo "poento", "punkto", "punto". "Poento" devenas de "point" (f.), punkto devenas de punctum (lat.) kaj "Punkt" (germ.), punto prenita el la lingvoj hispana kaj itala.

* * *

P.S. La artikolo estas detale trailegita de aŭstralia esperantistino Margaret Chaldecott, kiu proponis multe da valoraj rimarkigoj. Tie ĉi mi esprimas al ŝi miajn sincerajn dankojn.

La verkinto



ZHENG ZHENDUO KAJ LA ESPERANTO-ASOCIO DE JINAN- UNIVERSITATO DE SHANGHAI



Prof. Zheng Zhenduo

ĈIUFOJE, kiam oni preparolis la Esperanto-Asocion de Jinan-universitato en la tridekaj jaroj, mi tuj ekpensis pri profesoro Zheng Zhenduo.

Profesoro Zheng estis ĉina fama verkisto kaj literatura historiisto. Same kiel Lusin, li aprobis kaj varme subtenis Esperanton.

Antaŭ la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937, li laboris kiel rektoro de la Literatura Kolegio de Jinan-universitato de Shanghai kaj lekciiis pri la ĉina literatura historio. Ĉar li estis erudiciulo, ĉiufoje

kiam li donis lecionon, neniu el la sidlokoj de la klasĉambro restis vaka. Li ĝustatempe aperis sur la podio, kiam sonoris por leciono. Li estis tre modesta. Foje li demandis min, kian opinion mi havas pri la redaktado de la serio «Monda Literaturo» kompilita sub lia ĉefredaktoreco. Mi respondis kuraĝe: «Estus plej bone, se kelkaj literaturaj verkaĵoj en Esperanto estus metitaj en ĝin.» Li diris ke li atentis pri tio. Lia modesta sinteno vekis en mi estimon. Li prizorgis sanan kreskon de la junuloj, konsilis al ili ne neglekti sporton kaj diligente lerni fremdan lingvon. Siatempe li kumule funkciis kiel bibliotekestro de la lernejo. Dimanĉe studentoj ofte vidis ke li laboras kune kun la administrantoj en la biblioteko.

Profesoro Zheng tre zorgis la ĉinan kulturon, kaj samtempe ankaŭ la disvolviĝon de la monda kulturo. Li faris rimarkindan kontribuon en subteno de la Esperanta movado. La fondiĝo kaj disvolviĝo de la Esperanto-Asocio de Jinan-universitato en la komenco de la tridekaj jaroj estus neblaj sen lia helpo. Nur dank' al liaj klopodoj la Universitato registris la E-Asocion kiel sciencan rondon kaj donis al ĝi monan helpon por publikaj aktivadoj, tiel ke la Asocio povis ludi gravan rolon en la studenta movado.

La membroj de la Asocio venis el diversaj fakultatoj, plej multe el tiu de angla lingvo. Ili plejparte estis patriotaj progresemaj junuloj. Vespere de ĉiu sabato ili kolektis sin por lerni Esperanton. Zhuang Lizhang donis lecionojn kaj mi lin helpis. Dank' al diligenta lernado, multaj studentoj ellernis Esperanton en unu semestro. Plejparto de

ili povis paroli en Esperanto kun enmiksitaĵaj ĉinaj vortoj.

La Esperanto-Asocio okazigis Esperantan tekunvenon dufoje ĉiusemestre. En la kunveno la studentoj ekzercis sin per Esperanta konversacio, interŝanĝis sperton en lernado de Esperanto kaj prezentis artajn programojn. Krome oni okazigis ankaŭ ekskursojn kaj piknikon ĉiusemestre. Dum ekskurso oni interparolis en Esperanto, lernis patriotajn kantojn kontraŭ la japana agreso. Tiam la Kuomintang-reakciularo malpermesis al la progresemaj studentoj kanti patriotajn kantojn. La ekskurso estis tre bona aranĝo por rompi la malpermeson de la reaktiularo. Dank' al bona organizo de la gvidanto de la Asocio, la signifoplenaj ekskursoj alportis ĝojon al la partoprenantoj.

La Asocio ofte invitis eminentajn progresemajn personojn kaj klerulojn al la lernejo por fari paroladojn. Antaŭtagmeze de iu dimanĉo en la unua semestro de 1935, kamarado Hujucz, akompanate de rektoro Zheng Zhenduo, venis al la universitato por fari paroladon pri Esperanto. Informiĝinte pri tio, multe da studentoj-neesperantistoj venis por aŭskulti kaj tiel troplenigis la grandan klasĉambrom, ke oni devis translokiĝi de ĝi al la aŭlo. Unue profesoro Zheng faris enkondukon. Li diris ke kamarado Hujucz estas pioniro de la ĉina ĵurnalisma afero kaj la ĉina Esperanta movado, kaj ke en lernado de Esperanto, same kiel en alia lernado, oni devas havi klaran celon. La persona prezidado de tiu kunveno fare de profesoro Zheng multe plialtigis la prestiĝon de la Esperanto-Asocio en koro de la instruistoj kaj studentoj de la Universitato.



La aŭtoro Ri-
kardo Sulco

El ĉina poezio

EL ĈINA POEZIO: Esperantigis S. J. Zee. Eldonita de "El Popola Ĉinio", 1980. 156 p. 15cm. × 21cm. Prezoj: broŝ. US\$ 4.90, bind. 5.90. Mendebla ĉe la distribuantoj de "El Popola Ĉinio".

Tiun dupartan (antikvaj poemoj, modernaj poemoj) antologion el la ĉina poezio mi unue legis kaj poste trastudis kun granda kaj simpatia intereso. Ĝi donis al mi multon por pensi. Mi ne kapablas skribi eĉ nur iomete justan recenzon pri ĝi, ĉar mi la ĉinan ne scias, sekve mi ne povas kompari originalojn kaj tradukojn. Mi ĉi tie nur povas elplumigi miajn pensojn tiel, kiel ili venis al mi ĉe la legado.

La versaĵaron antaŭiras "rapida skizo" pri La Ĉina Klasika Poezio. El ĝi evidentiĝas tre konvinke la grandega diferenco inter la ĉina poezio kaj tiu de la Hindeŭropaj popoloj. La diferenco koncernas kaj la lingve kondiĉatan metrikon kaj la precipe preferatan temaron.

"Ĉinoj ne estas religiema popolo" diras prof. Saint Jules Zee kaj la precipa "karaktero de la ĉina klasika poezio estas ĝia humaneco". La koncepto de amo estas pli vasta ol ĝenerale en la okcidenta poezio. Ĝi respondas pli multe al "simpatia inklino" ol al "sekse inklino". La milito estas ofte amare kritikata, malpli ofte glorigata.

Ke Esperanto eblas transporti tiom grandan abismon de fremdeco, de geografie kaj historie tiom malproksimaj sentado kaj pensado, tio ĉiam denove plenigas min per miro kaj admiro. Por okcidentano kiel mi verŝajne apenaŭ eblas ĝuste taksii la malfacilaĵojn de la traduka tasko, kiun prenis sur sin kaj kiun plenumis la fora ĉina esperantisto.

Ŝajnas al mi necese, ke mi insistu pri tiu malfacileco, ĉar povus esti la efekto, kvazaŭ per miaj sekvontaj kritikaj rimarkoj mi intencus malpliigi la meriton de S. J. Zee. Li estas esperantisto kiel mi. Li apar-

tenas do al "mia popolo". Li estas amanto de poezio same kiel mi, kaj tio ŝajnas al mi forta ligilo, ĉar homoj de tiu speco ne estas multaj.

Mi komencu per margena rimarko. Ĝi koncernas la proprajn nomojn. La esperantistoj jam de longe kutimiĝis ekzemple al la skribo kaj konforma elparolado de

"El Ĉina Poezio"



Kelkaj el la membroj de la E-Asocio fervore faris internacian Esperantan korespondon. Ricevinte de la Shanghai-a Esperanto-Asocio adresojn de fremdlandaj amikoj, ili skribis al ili pri la agreso de la japana imperiismo al Ĉinio kaj ricevis bonajn respondojn. La Shanghai-a Esperanto-Asocio ofte sendis sian re-

prezentanton ĉeesti kunsidojn de la Esperanto-Asocio de Jinan-universitato, por direkti la lernadon de Esperanto kaj doni konsilojn. Kamarado Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen) iam ĉeestis nian kunsidon.

Post la komenco de la Kontraŭjapana Rezistmilito, multaj membroj de la Asocio kun pa-

trioti entuziasmo iris al la fronto de rezistado kontraŭ la japana agreso; iuj daŭre okupiĝis en la postfronto per nacisava laboro kaj persiste propagandis Esperanton en malfacilaj kondiĉoj. Ilia spirito estas lerninda por ni eĉ hodiaŭ. Kaj ilia spirito estas neapartigebla de la fervora edukado de profesoro Zheng Zhenduo.

Nove ricevitaj libroj

* *ESPERANTO-VORTARO PER TEMO-TABELOJ*, verkita de Michele Mariano, eldonita de Lima Gabrielli-Ascoli Piceno- Italujo. La unua libro de la Sciencia Eldon-Serio. Formato: 21 × 29.7 cm. 142 plus 12 p. Prezo ne montrita. Eldona kvanto 200 ekz. Ĝi enhavas 4,769 vortojn (inkluzive derivaĵojn). Vortaranĝo de la vortaro estas originala kaj logika, ke la vortoj estas klasifikitaj horizontale laŭteme kaj vertikale interne de ĉiu temo laŭ senca evoluo, kaj ĉe la fino troviĝas laŭalfabeta indekso.

* *LA NOKTMEZA KORTUMO* ĉefverko de la irlanda poeto Brian Merriman, tradukita de Albert Goodheir. Eldonita de Vulpo-Libro (W. F. Pilger, Lelystad,

Nederlando). Formato 16 × 21 cm. 36 p. kun ilustraĵoj. Prezo: 4.20 gld. plus sendkosto. Mendebla ĉe la eldoninto.

* *POST ŜTORMO* poemaro de Boris Pasternak, elrusigis kaj eldonis Kris Long (85 Point Royal, Bracknell, Berks, Britio). Formato: 15 × 10.5 cm. 36 p. Prezo ne montrita.

* *TEN-LESSON FREE POSTAL COURSE* (Senpaga koresponda kurso en dek lecionoj) eldonita de la Kanada Esperanto-Asocio (P. O. Box 2158, Sidney, B. C., V8L 3S3, Kanado). Formato 14.5 × 21.5 cm. 44 p.

* *RELIGIA TOLEREMO KAJ MALTOLEREMO* (prelego ĉe Universala Kongreso) de Albert Good-

heir, eld. Kvakera Esperantista Societo. Formato: 12.5 × 18.5 cm. 8 paĝoj plus kovrilo. Prezo ne montrita.

* *AVINJO RAKONTAS* de Maria Jančova, trad. Juraj Zahora kaj František Revay, eldonita de Esperantisto Slovaka. 14.5 × 20 cm. 56 p. Prezo ne montrita.

* *LA MORTO KAJ LA KURACISTO* de Heltai Jenö, esperantigita de Ladislao Somlai. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 13 × 19.5 cm. 18 p. Prezo: 1.8 gld. Mendebla ĉe la eldoninto.

* *SESDEK JAROJ* plus *ALDONAJ KONSIDEROJ* de Pietro Rizzo. Dua eldono. Formato 17 × 24 cm. 40 + 12 p. Prezo 6 gld. Mendebla ĉe Edistudio, Italujo.

* *TRIDEK ROLULOJ* kvin skeĉoj kun ekzercoj verkitaj de Stefan MacGill. Eldonita de TEJO. Formato 14.5 × 20.5 cm. 72 p. Prezo ne montrita.

Betoveno, Ŝekspiro kaj Napoleono. Kial ne krei esperantigitajn nomojn por tiuj elstaraj ĉinaj poetoj kiel Ĉaŭ Ĝi (Cao Zhi) aŭ Ĉaŭ Ĝio aŭ unuvorte Ĉaŭĝi aŭ Ĉaŭĝio, kiel Libajo, Dufuo, Ŭangŭejo kaj aliaj? Kiel ne tiel enigi tiujn poetojn en la Esperantan literaturon? Ĉu ili perdus per tio iom de sia ĉineco? Kial balasti la memoron de la legantoj krom per la por esperantistoj ĝuste prononcebla Esperanta ortografio ankaŭ per la nacilingvo?

Nun ni vidu! La antaŭparolo kaj tre multaj sukcesintaj versoj de la libro klare montras, ke profesoro Zee bone mastras nian lingvon kaj ke li ankaŭ estas konscia pri metrikaj reguloj. Tamen ofte aperas versoj, kies ritmo estas malglata. Tio mirigas des pli, ĉar malgranda ŝanĝo de la vortordo forigus tiun mankon.

(“Fajfás la vento, frostas la rivera flu’,...” p.8)

La vento fajfas, frostas la rivera flu’,...

(“La géedzój vivados en kunesto.” p. 52)

Vivados la geedzoj en kunesto.

(“Mi, málriĉá knabino, perlaboris. . .” p. 53)

Knabino mi, malriĉa, perlaboris. . .

(“Povrá maljuna kamparano sur dezerta monto. . .” p. 85)

Maljuna povra kamparano sur dezerta monto. . .

(“Forén kondukas sur aŭtuna monto vojoj ŝtonaj, . . .” p. 89)

Kondukas foren sur aŭtuna monto vojoj ŝtonaj. . .

Tiuj kvin ekzemploj de peko kontraŭ glata ritmo sufiĉu; kaj ekzistas aliaj versoj kun similaj mankoj, ne ĉiuj tiom facile plibonigeblaj.

Pli delikata demando estas tiu de

la rimoj. Tiurilate mi povas nur konstati, ke la tradukinto parigas vortojn, kiujn mi tute ne rigardas rimoj aŭ kiuj, se ili fakte estas intencataj kiel tiaj, malplaĉas al mia orelo. Jen ekzemploj: aranĝi/jam ĝi (p.4); cindro/vintro (p.9); halan/jaran (p.22); flago/krako (p.87) kombu/rompu (p.105). Pri tiaj licencoj oni povas ja havigi tre malsamajn opiniojn. Sed estas apenaŭ agrable, se ili amasiĝas en alta poezio. Ĉu estus eble eviti ilin en la kolekto, estas apenaŭ prijuĝebla sen kono de la originaloj.

Tiom pri ritmo kaj rimoj. Ni legas je la fino de la antaŭparolo, ke “la ĉina klasika lingvo estas multe pli konciza ol Esperanto” kaj ke “dum la tradukado oni ĉiam trovas sin postiganta en la vetkurado eĉ DUOBLIGANTE la longecon de ĉiu verso”. Jen la KANTO DE JING KE (p. 8):

(Daŭrigota sur p. 32)

Dongtingshan-monto

de ZHIGANG kaj NAIGUANG

DONGTINGSHAN-MONTO de Jiangsu (Giangsu)-provinco situas 40 km. sudokcidente de Suzhou kaj estas unu el la pitoreskaj montoj ĉe Taihu-lago de Ĉinio. Ĝi fakte estas du montoj — la Okcidenta kaj la Orienta Dongtingshan, kiuj distancas je 4 km. En Taihu-lago troviĝas 72 vidindaj montpintoj, el kiuj 58 apartenas al Dongtingshan-monto. Ilia ĉarmo allogas sen-nombrajn turistojn. Frue en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (722 a. K.-481 a. K.) ĝi jam fariĝis vidinda loko de Wu-regno.

La Okcidenta Dongtingshan estas izolita insuleto kun areo de 90 kvadrataj kilometroj. Ĝia ĉefa montpinto Piaomiaofeng, situanta en la centro de la insuleto, altas je 336 metroj, kies branĉoj etendiĝas ĉiudirekten sur la verda fono kaj malaltiĝas iom post iom. Vidate de malproksime la monto aspektas kiel lotusfloro flosanta en Taihu-lago.


La Orienta Dongtingshan estas duoninsulo kun areo de 63 kvadrataj kilometroj. Ĝia ĉefa mont-

pinto Molifeng majeste leviĝanta en la norda parto de la duoninsulo, altas je 293 metroj. Ĝiaj branĉoj etendiĝas ĉefe suden. Ili vidiĝas kvazaŭ lotusradiko bordanta la lagon.

La fame konata templo Zijin'an situas en la valo Ximaowu ĉirkaŭanta de verdaj montoj de la Orienta Dongtingshan. Tiu templo en kvietaj medio konstruiĝis en Tang-dinastio (618-907 p. K.). La halo impresas la vizitantojn kvazaŭ mirinda galerio. La arahatoj en la halo estas famaj antikvaj skulptaĵoj de Ĉinio. Inter ili 16 estis skulptitaj de la popolaj skulptistoj geedzoj Lei Chao de la Suda Song-dinastio (1127-1279 p. K.). Iuj el la figuroj prezentas dormetantojn, aliaj meditantejn kaj triaj mokridetantojn. Iliaj trajtoj kaj mienoj diferencas unu de alia. Laŭdire, Lei Chao vivis 16 jarojn kune kun bonzoj de unu templo por bone skulpti tiujn arahatojn. Do ne estas mirige, ke tiuj skulptaĵoj havas tian artan ĉarmecon.

Sur la Orienta Dongtingshan estas vilaĝo Yangwan, en kiu troviĝas majesta Xuanyuan-palaco alfrontanta la lagon kaj staranta en osmant-arbaro sur montdeklivo, konstruita en Yuan-dinastio (1279-1368 p. K.). En la orienta parto de la vilaĝo estas ankoraŭ konservata unu strato konstruita en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). Kvankam ĝia fizionomio iom ŝanĝiĝis, tamen oni ankoraŭ povas vidi ĝian arkitekturan stilon de Ming-dinastio.

En tiu loko troviĝas ankaŭ famaj modernaj konstruaĵoj, el tiuj estas



La pordego el brikoj kun skulptitaj bildoj de la vestiblo de la konstruajaro Diaohualou.

la konstruajaro Diaohualou, konstruita en 1922. Ĝi kun pli ol 40 ĉambroj okupas areon de 1,100 kvadrataj metroj. En ĝi estas multaj delikataj gravuraĵoj pri historiaj temoj, famaj tra suda Ĉinio. La pordego estis masonita tute el brikoj kun gravuritaj bildoj. En ĝia vestiblo koncentriĝis ĝiaj plej bonaj lignogravuraĵoj, tie ĉiuj pordoj, fenestroj, kolonoj kaj traboj estas plenaj de diversaj gravuraĵoj, sole sur ili estas 172 gravuritaj feniksoj kun diversaj pozoj. Ĝiaj skulptaĵoj troviĝas ĉefe sur la tegmentaj eĝoj kaj anguloj, kies skulpturo libera kaj simpla kontrastas akre kun la delikataj gravuraĵoj en la domo, kaj multe pliigis la artan guston de la konstruajaro.

La vidindaj lokoj de la Okcidenta Dongtingshan estas pli ravaj. Jam en la antikveco tie troviĝis la pitoreskejoj "Vespera Kuirfumo de Linwu", "Aŭtuna Luno ĉe Shigong" k.a. Nun la nove konstruitaj ŝoseoj ĉirkaŭ la lago estas oportunaj por turistaj aktivadoj.


La nigraroka monteto Linwu sin trovas tuj apud Taihu-lago oriente de la ĉefa montpinto Piaomiaofeng. Tie estas la fama kaverno Linwu,

sur kies nigra roko estas gravuritaj la fortaj vortoj "la Naŭa Kaverno de Ĉinio". La kaverno kun zigzagaj vojetoj estas vasta kaj profunda. En ĝi troviĝas ŝtonaj sonorilo kaj tamburo, sur ĝiaj volboj pendas stalaktitoj, la ambaŭflankaj rokoj aspektas kiel falakvo. Enirinte en ĝin, oni sentas sin kvazaŭ en paradizo. Sur la monteto estas diversaj groteskaj rokoj kun formoj de staranta, kuŝanta aŭ kaŭranta rinocero, elefanto, bovo kaj ŝafo. La ŝtonoj produktitaj tie portas plej diversajn groteskajn formojn kaj estas vaste uzataj por konstrui artefaritajn montetojn en ĉinaj ĝardenoj. La monteto Linwu estas vere bela, kiam la suno subiras, la vesperruĝo brilas en la ĉiela rando, ventetoj levas blujajn ondetojn sur la lago kaj leviĝas kuirfumo tie kaj ĉi tie. Tial ĝi ricevis la nomon "Vespera Kuirfumo de Linwu".


Piedirinte 4-5 kilometrojn laŭ la bordo sudorienten de la monteto Linwu oni jam vidas monton etendiĝantan en la lagon. Ĝi estas la monto Shigong, kie abundas groteskaj rokoj. Sur ĝiaj montaliaj padoj oni povas sate ĝui ĝian belan pejzaĝon. Dekstre de ĝi troviĝas

kaverno simila al ŝtona ĉambro kaj apude estas la "Kiosko por Gruo" kun suprenlevitaj tegmentanguloj. Starante tie oni vidas, ke sur la ondetanta akvo glitas velŝipoj, ŝvebas blankaj nuboj kaj plaŭdas la akvo kontraŭ la rokmuoj disŝprucigante akverojn. Vere ĉarma pejzaĝo por la turistoj. Piedirinte antaŭen centojn da paŝoj de tie oni atingas la "Vesperluman Kavernon". Interne de tiu malgranda kaverno pendas du stalaktitoj kun formo de renverse pendantaj pagodoj. En ĝia volbo troviĝas longa mallarĝa fendo, tra kiu la vespera suno povas prilumi la internon. Tial ĝi ricevis la nomon. Irinte iom antaŭen, oni devas ascendi krutan ŝtuparon. Atinĝinte la Sun-malleviĝan Terason, oni povas ĝui alian belan pejzaĝon.

Dongtingshan-monto allogas la homojn ne nur per sia bela pejzaĝo, sed ankaŭ per siaj umeoj, persikoj, prunoj, abrikotoj, jujuboj, kaŝtanoj, fruktoj de eribotrio, miriko (*Myrica rubra*), ginko kaj mandarinoj. Tial ĝi estas nomata Monto de Frukto. La fruprintempe produktita teo Biluochun en tiu loko estas unu el la dek plej famaj specoj de teo de Ĉinio.



Knabinoj kolektas tefoliojn.




Pejzaĝoj de Dongting-monto

Fotoj de FENG YUNQING kaj REN REN


Tiu ĉi serio da fotoj prezentas pejzaĝojn de Dongting-monto, unu el la pitoreskejoj de Taihu-lago. Jiangsu-provinco de Ĉinio.




Kolekti lotussemojn



Antikvaj statuoj de arhatoj en la templo Zijin



Ĉe la piedo de Dongting-monto



La templo Zijin en verdajo

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

La Tria Internacia Skolta Esperanto-Tendaro

de GRBO SMAIL (Jugoslavio)



Bela angulo en Amsterdama parko

de W. J. NIJVELD (Nederlando)





LA UNUA AZIA INTERNACIA EKSPOZICIO DE ARTAJ FOTOGRAFAĴOJ

En julio ĉijare la nomita ekspozicio havis lokon en Beijing (Pekino). En ĝi estis eksponataj pli ol 460 verkoj, el kiuj 24 estis premiitaj. La verkoj "Edziniĝa Tago" de Japanio kaj "Patrino Amo" de Singapuro gajnis la unuagradan premion de nigra-blanka foto. La verko "Komuna Peno" de Malajzio, kiu prikantas ĝian diligentan popolon, gajnis la unuagradan premion de kolora foto. Ankaŭ verkoj de tri ĉinaj fotistoj estis premiitaj.

La ekspozicion partoprenis Ĉinio, Bangladeŝo, Pakistano, Hindio, Indonezio, Japanio, Irano, la Filipinoj, Singapuro, Turkio kaj aliaj 4 landoj kaj la regionoj Hongkong kaj Aomen.

LA PLEJ BELAJ POŝTMARKOJ DE ĈINIO EN 1980

La ĉinaj poŝtmarko-serioj "Verkoj de Qi Baishi" kaj "Antikvaj Ĉinaj Sciencistoj" estas elektitaj kiel la plej belaj. La projektintoj de la poŝtmarkoj estis premiitaj per klozonea pokalo, atesto kaj memorajo.

La redakcio de la gazeto "Filatelo" aranĝis la aktivadon. Ĝi disdonis 160,000 balotilojn. La elekton faris filatelistoj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, kaj ankaŭ tiuj de Japanio, Usono, Francio, FR Germanio, Kanado, Malajzio, Singapuro, Svedio, Nederlando, Indonezio kaj Tajlando, kaj de Hongkong kaj Aomen.

GRANDA MOVEBLA TEATRO KONSTRUITA EN ĈINIO

Lastatempe Ĉinio konstruis grandan moveblan teatron en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĝi povas esti uzata de grandaj artistaj trupoj dum ilia turneo en kamparo kaj paŝtejo.

Ĝi estas farita el veltolo, ŝtaloj, alumini-alojajoj, ligno kaj aliaj materialoj. Ĝi estas transportebla per ŝarĝaŭto kaj starigebla en 8 horoj. La starigita tendo havas

duonsferan formon sen trabo, kun volba alteco de 7.5 metroj kaj mura alteco de 2 metroj. Dank' al ĝi oni povas fari prezentadon eĉ en ŝtorma aŭ pluvega vetero.

La teatro konsistas el halo, scenejo, tualetejo kaj loĝejo por aktoroj. La halo havas 1,200 sidlokojn. La scenejo havas kolorajn lamplumojn kaj lumbildajn dekoraciojn kaj donas bonan akustikon.

La Kultura Ministerio de Ĉinio ekzamenis ĝin kaj decidis pograndede produkti tiajn teatrojn.

FILMOJ EN NACIMINORITAJ LINGVOJ

La rakonta filmo de Ĉinio "En Nebula Urbo" kaj ĝia scienc-eduka filmo "La Reĝo de la Herboj" dublitaj en la ĥalĥaza lingvo estis unuafoje projekciataj lastatempe en la Kizilsu-a Ĥalĥaza Aŭtonoma Subregiono sur la Pamira Altebenaĵo en Xinjiang. La ĥalĥaza popolo nombranta ĉ. 100,000 unuafoje rigardis filmojn en sia nacieca lingvo.

Dum la lastaj jaroj, por riĉigi la kulture vivon de la naciminoritatoj de la landlima regiono, la kultura departemento de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono dublis filmojn en naciminoritataj lingvoj. Pasintjare, la Tianshan-a Studio de Xinjiang dublis en la ujgura kaj kazaha lingvoj 24 ĉinajn rakontajn filmojn kaj plurajn alilandajn filmojn.

AGRIKULTURA DISAŬDIGA LERNEJO EN BEIJING

Meze de julio la Centra Agrikultura Disaŭdiga Lernejo ekfunkciis en Beijing. Ĝi estas la unua tutlanda lernejo, kiu donas mezgradan edukon al agrikulturaj kadroj kaj teknikistoj kaj intelektaj gejunuloj en la kamparo. Ĝi jam akceptis 250,000 lernantojn, kiuj studos en du jaroj la kvar kursojn de fundamenta kemio, plantajoj kaj ilia fiziologio, grundo kaj sterko, genetiko kaj selektado.

VIOLONA KONKURSO DE ĈINIO

En la mezo de julio la Kultura Ministerio de Ĉinio okazigis la tutlandan violonan konkurson por lernantoj de konservatorioj kaj artaj lernejoj. Zhang Le, 13-jara lernanto de la Dependenda Mezlernejo de la Shanghai-a Konservatorio, gajnis la unuan lokon en la geknaba grupo, kaj, Liu Jian, 17-jara lernantino de la Dependenda Mezlernejo de la Centra Konservatorio, gajnis la unuan lokon en la gejunula grupo. Po kvin ludantoj gajnis la duan kaj trian lokojn en la gejunula grupo. Sep ludantoj en la geknaba grupo estis premiitaj.

La muzikpecoj luditaj en la konkurso estis el ĉinaj kaj eksterlandaj muzikaj verkoj kies ludo postulas grandan penon. En la konkurso, oni faris al la ludantoj severan ekzamenon pri diversaj stiloj kaj teknikoj. Dank' al sia diligenteco la ludantoj atingis altan nivelon.

"MARKO POLO" FILMATA EN ĈINIO

Post unujara preparado estas filmataj la ĉinaj scenoj de la biografio filmo "Marko Polo", la lasta kaj la plej grava parto de la filmo, pri kiu kunlaboras Ĉinio kaj Italio. La filmo priskribas la aventuron de Marko Polo, granda vojaĝisto de Italio kaj sendito por amikeco inter Ĉinio kaj Italio, kiu vivis en Ĉinio 17 jarojn. Krom ĉinaj kaj italaj aktoroj, filmludas ankaŭ aktoroj el Usono, Japanio kaj Britio.

Antaŭ ol komenci filmadon en Ĉinio, la filmistoj plenumis filmadon en Venecio, Nepalo kaj Maroko. Ĝis nun pli ol 70 landoj volis mendi la filmon.

“VERDA MAJO” ELDONITA EN ĈINIO

Memore al la fama internacia batalantino kaj japana esperantistino Verda Majo eldoniĝis «Verda





La libro “Verda Majo”

Majo» en la ĉina lingvo en Beijing (Pekino) en julio de la kuranta jaro. En la libro estas kolektitaj “En Ĉinio Batalanta”, “Flustr’ el Uragano” kaj ŝiaj aliaj verkoj kaj artikoloj verkitaj de ŝiaj amikoj kaj parencoj por memori ŝin. En la unuaj paĝoj estas fotoj de ŝia familio kaj ŝiaj manskribaĵoj kaj en la lastaj paĝoj estas kronologiaj notoj pri Verda Majo, tabelo de ŝiaj verkoj kaj Esperanta indekso de la libro.

Jezezo, vicprezidanto de ĈEL kaj amiko de Verda Majo, verkis por ĝi antaŭparolon, en kiu li rakontis pri ŝia batala vivo kaj laŭdis ŝiajn kontribuojn por la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj.

Esperanta Kurso en la Liuzhi-a Speciala Regiono



Fenestro de Esperanto aranĝita
de la Liuzhi-a Esperanto-Asocio

La libro estas kompilita kaj tradukita de ĉina esperantisto Gong Peikang kaj eldonita de Sanlian-librejo.

PREPARA GRUPO DE LA ESPERANTA INSTITUTE DE JIANGSU-PROVINCO FONDITA

Por kunligi la esperantistojn kaj Esp-aprobantojn de Jiangsu-provinco, plifortigi disvastigon, instruadon kaj studon de Esperanto, laŭ la propono de la Tria Sesio de la Kvina Popola Kongreso de Jiangsu, la Filozofi-Sociologia Federacio kunvokis esperantistojn en Nanjing, ĉefurbo de la provinco, al kunsido kiu decidis fondi preparan grupon por la Esperanta Instituto de la provinco kaj elektis ĝian gvidanton. Prof. Zhu Yigui de la Nanjing-a Universitato estis elektita kiel la grupestro. La grupo decidis kunvoki inaŭguran kongreson de la instituto la 15-an de decembro, t.e. la datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof, kaj en la sama tempo kunvoki la unuan Esperantan simpozion de la provinco.

LA ESPERANTO-ASOCIO DE LIUZHI FONDITA

La 6-an de junio fondiĝis la nomita asocio post tri-monata preparo.

La speciala regiono Liuzhi estas nove aperinta industria regiono. Kvankam tie nur malmulte da loĝantoj konis Esperanton, tamen subtenate de la lokaj scienca-teknika asocio, laborista sindikato, Komunisma Junulara Ligo, virina federacio kaj eduka buroo, esperantistoj de tiu loko funkciigis Esp-kurson kaj malfermis Esperantan montrofenestron, tiel ke ili preparis bonajn kondiĉojn por fondi la asocion. Nun tiu asocio jam havas kontakton kun la esperantaj organizadoj de Beijing, Shanghai, Wuhan, Guiyang kaj aliaj lokoj.

NUNA ESP-MOVADO EN BEIJING

La 5-an de julio la Pekina Esp-asocio okazigis sian membraran kunvenon en la Kultura Palaco de Laboruloj, en kiu ĝi resumis sian laboron pri propagando, eldonado, edukado kaj akcepto de fremdlandaj esperantistoj kaj ellaboris laborplanon por la lasta duonjaro. En la unua duonjaro la Pekina Esp-asocio akiris rimarkindajn sukcesojn en la edukado: Ĝi funkciigis tri elementajn kursojn kaj unu duagradan kurson en du mezlernejoj kun 140 kursanoj. En aŭgusto la asocio funkciigis rapidan kurson por fremdlingvaj instruistoj de superaj

lernejoj kaj tradukistoj de scienco-
 esploraj unuoj en la Beijing-a Ling-
 va Instituto. La monata lekcio ha-
 vigis al ili la rudimentan gramati-
 kon de Esperanto.

Por levi la kapablon de aŭdo kaj
 parolo de la asocioj kaj kursanoj
 la asocio okazigis la "Unuan Some-
 ran Semajnon de Beijing-aj Esperan-
 tistoj" en la Beijing-a Lingva Insti-
 tuto ĉi-somere. Dum la semajno oni
 havis lekciojn pri Esperantaj konver-
 sacio, aŭdado kaj gramatiko, kun-
 venojn de deklamado, rakontado kaj
 interŝanĝo de sperto en studo kaj
 artajn kaj sportajn aktivecojn.

Cetere, la Xicheng-distrikta Ge-
 knaba Domo okazigis duagradan
 Esp-kurson kun pli ol 200 lernantoj,
 kies lernado daŭros duonjaron.

**NOVJORKA URBESTRO PRO-
 KLAMIS INTERNACIAN
 AMIKECAN ESPERANTO-
 SEMAJNON**

Montrante senprecedencan subte-
 non al la idealo de Esperanto, Ed-
 ward Koch, urbestro de Novjorko,
 solene deklaris la semajnon 12-18
 julio Internacia Amikeca Esperanto-
 Semajno.

"Reciproka aprezado kaj kolegeco
 estus plifortigitaj se ekzistus unu
 ĝenerale akceptita neŭtrala apoga
 lingvo," skribis la urbestro. "Espe-
 ranto jam elmontris sian facilecon
 de lernado kaj siajn praktikajn utile-
 cojn en plibonigita komunikado."

La proklamo de la urbestro rezul-
 tis el interveno de anoj de la Labor-
 grupo de UEA ĉe Unuiĝintaj Na-
 cioj, kaj ĝi estas ankoraŭ unu ek-
 zemplo de la konsiderinda efikeco
 de la oficejo de UEA en la eksteraj
 rilatoj de la Esperanto-movado.

**ESPERANTO KIEL LINGVA
 KOMUNIKILO SINE DE O.P.E.**

La 20-an de feb. 1981, dum kun-
 veno de la Konstanta Delegitaro de
 Organizo de la Popoloj Eŭropaj,
 estis decidita adopti Esperanton kiel
 lingvan komunikilon sine de tiu or-
 ganizo, krom la angla kaj la franca

*La proklamo de
 Edward Koch, la
 urbestro de Nov-
 jorko*

Proclamation

by order of
 Edward L. Koch
 Mayor of the
 City of New York

NEW YORK HAS BEEN THE POINT OF ENTRY FOR MILLIONS FROM EVERY LAND
 INTO A BRIGHTER AND BETTER LIFE IN THE NEW WORLD.

THE CITY ENJOYS WORLD-WIDE FAME FOR ITS ECONOMIC AND CULTURAL
 RICHNESS AND CONTINUES TO HOST A CONTINUAL STREAM OF VISITORS.

NEW YORK HAS FOR MANY YEARS SERVED AS THE CHIEF OFFICE OF THE UNITED
 NATIONS AND ITS 153 AFFILIATED NATIONS ALL INTERESTED IN A GLOBAL VIEW
 OF HUMANITY.

MUTUAL APPRECIATION AND FELLOWSHIP WOULD BE ENHANCED IF THERE WERE
 ONE ACCEPTED NEUTRAL SECONDARY TONGUE TO FACILITATE COMMUNICATION
 AMONG THE SPEAKERS OF THE EXISTING 1900 NATIVE TONGUES. ESPERANTO HAS
 DEMONSTRATED THE EASE WITH WHICH IT CAN BE LEARNED AND ITS PRACTICAL
 USES IN IMPROVED COMMUNICATION.

NOW, THEREFORE, I, EDWARD L. KOCH, MAYOR OF THE CITY OF NEW YORK, DO
 HEREBY PROCLAIM THE WEEK OF JULY 12-18, 1981, AS

"INTERNATIONAL FRIENDSHIP ESPERANTO WEEK"

IN NEW YORK CITY, TO COINCIDE WITH THE ANNUAL CONFERENCE OF THE ESPERANTO
 LEAGUE FOR NORTH AMERICA IN THIS CITY.

IN WITNESS WHEREOF I HAVE HEREUNTO
 SET MY HAND AND CAUSED THE SEAL OF
 THE CITY OF NEW YORK TO BE AFFIXED.

Edward L. Koch

kiujn ili ĝis nun uzis. Laŭ ilia
 opinio, Esperanto fariĝu estonte la
 sola eŭropa komunikilo.

**ESPERANTISTOJ EL BERLINO
 OKCIDENTA VIZITIS
 SVEDAN KONGRESON**

Grupo de esperantistoj el Berlino
 Okcidenta vizitis de la 5-a ĝis la 8-a
 de junio la Esp. Kongreson okaze de
 la komuna 75-jara jubileo de Sveda
 Esperanto Federacio kaj Klubo Es-
 perantista de Malmo. La esperan-
 tistoj de Berlino estis varme akcep-
 titaj de la esperantistaj amikoj de
 Malmo. La programo de la kon-
 greso estis tre varia pro la gastoj.

**NOVA ESP. INFORMILO
 PRI DRACHTEN**

Antaŭ nelonge aperis nova Esp.
 informilo pri Drachten, urbo en
 Frislando, Nederlando. La distri-

buon prizorgas Esperanto-Centro
 Nederlanda, Riouwstraat 172, 2585
 HW Hago, Nederlando. La infor-
 milo estas senkoste akirebla nur
 kontraŭ respondkupono por kovri
 sendkoston ĉe menciita adreso.

**FRANCA ESP-ISTO DOKTORIĜIS
 PRO STUDIO PRI ESPERANTO**

Doktoriga disertacio pri Esperan-
 to, kiun franca esperantisto Francois
 Lo Jacomo preparis de pluraj jaroj
 sub gvido de Andre Martinet, estis
 defendita je la 29-a de junio 1981
 en Sorbonne. Ĉeestis tridek spek-
 tintoj. Post trihora vigla diskuto
 inter la juĝantoj kaj la defendanto,
 la disertacio estis akceptita kun
 mencio "tre bone". La rezultanta
 diploma, triacikla doktoreco pri
 lingvistiko, rajtigas kandidatiĝi al
 universitata instru-posteno.

Ni estas filoj de "Torĉo"

MI, 18-jara, estas laboristo de la Beijing-a Fabriko de Bioke-miaj Instrumentoj, kaj mia frato Jiang Yushun, 13-jara, lernas en la Beijing-a 175-a Mezlernejo. Ni estas orfoj, elkreskintaj sub zorgado de la Beijing-a Lanteksejo "Torĉo", tial oni nomas nin filoj de "Torĉo".

La nomo "Torĉo" ĉiam aparte kortuŝas min kaj mian fraton, ĉar ĝi rememorigis al ni neordinaran travivaĵon. En la infaneco ankaŭ ni havis feliĉan familion. Sed poste nin senkompatate atakis fataloj unu post alia. En aŭtuno de 1974, la patrino forpasis pro malsano. Unu jaron poste, ankaŭ la patro mortis de sepsemio. Tiam mi estis nur 12-jara, kaj la frato 7-jara. Niaj infanaj koroj preskaŭ krevis de tiuj pezaj batoj. Mi kaj la frato plorkriis ĉe la patro: "Paĉjo, ho ve! kial vi forlasis nin, kaj kiu zorgos nin, paĉjo!" Ankaŭ larmis apud-estantaj onkloj. Onklo Meng Yuyin, vicprezidanto de la laborista sindikato de la fabriko kiu respondecis pri la funebro, premis min al sia sino kaj diris: "Ne ploru, mia infano! De nun nia fabriko 'Torĉo' zorgos vin, mi zorgos vin. Ni ĉi-

uj estas viaj karuloj." Tiuj konsolaj vortoj multe trankviligis nin.

La fabriko decidis, ke la laborista sindikato respondecu pri nia ĉiutaga vivo. Nelonge poste, mi kune kun la frato transloĝiĝis en apartamenton de la laboristoj kaj oficistoj. La fabriko pretigis por ni novajn litojn, lit-kovrilojn kaj matracojn. Ŝajnis al ni, ke ni venis al nova hejmo. Ĉiumonate, la fabriko donis al ni monon por manĝo kaj aliaj elspezoj. Okaze de la ŝanĝiĝo de sezono, geonkloj de la sindikato akompanis nin al magazeno por aĉeti vestaĵojn. Pluraj onklinoj ofte lavis por ni vestojn kaj lit-kovrilojn. Onklino ankaŭ trikis por la frato novan ĵerzon. Ni senpage vizitis la lernejon. La fabriko pagis al ni por libroj, kajeroj kaj skribiloj. Kiam okazis printempa ekskurso de la lernejo, la fabrika manĝejo preparis por ni panon, stufitajn ovojn ktp., por ke ni, same kiel aliaj infanoj, gaje ĝuu la ekskurson. Dum la festtagoj geonkloj invitis nin al siaj hejmoj, por ke ni ĝoje pasigu festojn kune kun iliaj infanoj. La fabriko donacis al ni ankaŭ bombonojn kaj petardojn. En la pasintaj kvin

jaroj, la fabriko elspezis por ni sume pli ol 2,700 juanojn. Plie, nekalkulebla per mono ja estas ilia prizorgado al ni.

Kiam ni ĵus transloĝiĝis en la fabrikon, la frato ofte ploris sopirante je paĉjo kaj panjo. Pro tio onklo Meng venigis nin al sia hejmo kaj ni loĝis tie duonjaron. La geonkloj Meng traktis nin pli intime ol siajn filojn. Ili estis ja ne riĉaj, tamen ili faris ĉion eblan por pretigi bongustaĵojn por ni. Iufoje, onklino Meng frikasis fiŝon. Ŝi donis la mezan parton al mi kaj mia frato, kaj la finajn partojn al siaj propraj infanoj. La avino diris, ke ŝi tro dorlotis nin. Onklo Meng diris al la avino: "En la malnova socio, ankaŭ mi estis orfo, kaj mi spertis malfeliĉon senpatrinan. Nun ili perdis la gepatrojn, ĉu ni ne devas prizorgi ilin?" Je tiuj vortoj, larmoj nedeteneble ekgutis el miaj okuloj. La frato emocie sin kroĉis al la kolo de onklino Meng kaj diris: "Onjo, vi ja estas mia propra panjo, kaj mi, via propra filo!"

Ne finciteblaj estas la kortuŝaj okazintaĵoj. Iusomere, mi febris

Jiang Yuqun (la maldekstra) helpas sian fraton en lernado.



Geedzoj Meng Baoyin intime interparolas kun Jiang Yuqun kaj Jiang Yushun.



BELA DONACO

AL LA ABONANTOJ DE 1982



JAM komenciĝas la varbkampanjo de 1982 por El Popola Ĉinio. Tuj abonu ĝin jam nun! Se vi abonos ĝin en la periodo de la 1-a de novembro ĉijare ĝis la 28-a de februaro venontjare, vi povos senpage ricevi la belan kalendaron de 1982.

La kalendaro estas eldonita de nia redakcio por ĉiuj abonantoj, inkluzive tiujn, kiuj faros sian abonon dum la varbperiodo. Ĝi havas 14 paĝojn kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj kaj estas en formato de 37.5 cm X 25.5 cm. Tiu bela donaco bone servos al vi ne nur kiel kalendaro tutjare, sed ankaŭ kiel valora artaĵo por longe.

Ni dankeme esperas, ke vi abonu aŭ reabonu la gazeton ĝustatempe. Senpage specimeno de EPC estas sendata laŭ peto.

Bonvolu sendi vian abonilon kaj abonkotizon al peranto en via lando aŭ la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

La Redakcio de EPC

pro malsano. La prezidanto de la sindikato Wang Dehuai akompanis min al hospitalo. Reveninte al la loĝejo, li helpis min preni medikamenton... Kiam li foriris, mi estis kuŝanta sola en la ĉambro kaj ekmemoris la gepatrojn. Guste kiam mi silente larmis, kuiristino onklino Zhang venis portante bovlon da nudelo, poste venis ankaŭ onklino Meng kun fruktoj kaj miaj instruistoj kaj onkloj el la fabriko. Rigardante la frandaĵojn antaŭ la lito, kaj aŭskultante ilian konsolon, mi sentis varmon en la koro anstataŭ malĝojon.

La laborista sindikato de la fabriko kaj ĉiuj kamaradoj prizorgis nin ne nur en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en la lernado. Ili inokulis al ni bonan moralon. Ĉiufoje kiam la lernejo kunvenigis la gepatrojn de la lernantoj, la fabriko sendis

delegiton kaj poste faris kun ni koran konversacion por helpi nin laŭ niaj kondutoj en la lernejo. Des pli neforgesebla por mi estas mia ĉefinstruistino Liu Qing. Komence de mia studo en la mezlernejo, mi lernis malpli bone, kaj iam perdis memfidon al daŭra lernado. Mia ĉefinstruistino Liu unuflanke donis al mi helpon en lernado, aliflanke rakontis al mi pri idealo de la junularo kaj la signifo de lernado. Ŝi donacis al mi librojn kaj kajorojn, kaj kuraĝigis min kuratinti elstarajn kunlernantojn. De tiam mi absorbite aŭskultis lekcion, kaj serioze plenumis la hejman taskon. Tiamaniere mi multe progresis en lernado.

En 1978, mi finis la lernadon en malsupera mezlernejo kaj ekvizitis teknikan lernejon. Post diplomitiĝo mi fariĝis laboristo. Post kiam mi

havis sendependan vivtenan kapablon, mi kaj la frato revenis al nia propra hejmo. Antaŭ la transloĝiĝo, la sindikato de la fabriko kalkis nian domon, aĉetis por ni fornon kaj diversajn kuirilojn, lavpelvojn, benkojn, termosojn kaj aliajn ĉiutagajn vivbezonaĵojn. La fabriko kiel antaŭe donis subvencion al mia frato ĉiumonate kaj ofte sendis informiĝi pri nia stato. La najbaroj loĝantaj en la sama korto fervore zorgis nin kiel niaj parencoj. Precipe avino Zhu helpis nin en la tuta dommastrumado.

Kun kresko de mia aĝo, mi pli kaj pli profunde komprenis la valoron de tiu feliĉa kaj neforgesebla vivo. Mi forte sentas, kiom kompakte ligiĝas nia sorto kun nia socio.




Popola edukisto Tao Xingzhi

LA 18-a de oktobro ĉi-jare estas la 90-a datreveno de la naskiĝo de fama ĉina edukisto Tao Xingzhi. Ĝin solenos ĉinaj kulturaj kaj edukaj rondoj.

S-ro Tao Xingzhi dediĉis sian tutan vivon al ĝeneraligo de la popola eduko. Li elmetis la slo-

S-ro Tao Xingzhi (maldekstre) studanta en la Kolombiana Universitato de Usono



ganojn “La vivo mem estas eduko”, “La socio estas lernejo” kaj “Kombini la instruadon, lernadon kaj praktikadon”, kiujn li plenumis kun plena energio. Li fondis lernejojn por ordinaraj popolanoj kaj pledis por kampara eduko, kaj pro tio li estis alte taksata de la tiama ĉina edukistaro kaj ĝuis grandan prestiĝon.

Tao Xingzhi origine nomata Tao Wenjun naskiĝis en 1891 en malriĉa familio en kamparo de orienta Anhui-provinco de Ĉinio. La laboremo de liaj gepatroj influis lin profunde, ke en sia knabeco li jam kutimiĝis al kamplaboro, vivis modestan vivon kaj havis simpatian por la laboranta popolo.

Li lernis tre diligente. En sia 19-jara aĝo li estis akceptita en la literaturan fakultaton de Jinling-universitato de Nanĵing (Nankino) kaj diplomitiĝis je unu jaro pli frue pro bona sukceso en studo. En tiu tempo li sekvis la tezon de ĉina antikva filozofo Wang Yangming pri kombino de kono kaj ago, nome “kono estas komenco de ago kaj ago estas fino de kono”, kaj sin alinomis Tao Zhixing (en la ĉina lingvo *zhi* signifas konon kaj *xing* agon). Baldaŭ li, puŝate de la epoka tajdo, vojaĝis al Usono por studo per pruntita mono. Ko-



En septembro de 1937, s-ro Tao Xingzhi propagandis en Meksikio la kontraŭjapanan nacisavan movadon de la ĉina popolo.

mence li studis urban administradon en la Ilinojsa Universitato, kaj post duonjaro li eniris en la Kolombian Universitaton por studi pedagogion kaj fariĝis lernanto de usona empirisma edukisto John Dewey.


En 1917 li revenis al la patrolando kun diplomo de politika magistro kaj tiu de eduka inspektoro. Kun la idealo “savi la nacion per eduko” li dediĉis sian energion al reformado de la ĉina eduko. Li prezentis multajn tiuflankajn proponojn. En 1920 li funkciis kiel ĝenerala direktoro de la Ĉina Eduko-reforma Societo, kaj liaj traktaĵoj pri reformo de la ĉina eduko aperis sinsekve en la gazeto “Nova Eduko”. Dume li iniciatis la Ĉinan Asocion por Akcelo de Eduko de Ordinaraj Popolanoj, kompilis la “Milvortan Lernolibron por Ordinaraj Popolanoj”, fondis multajn lernejojn kaj kursojn por ordinaraj popolanoj kaj iris diversloken por antaŭenigi tian

edukon movadon. Li deziris forigi la neegalecon de la sociaj klasoj per tia eduko. Komprenoble tio estis nerealigebla. Malvenkis la eduka movado, li tamen ne perdis kuraĝon. Li vidis, ke Ĉinio estas lando kun vasta kamparo, sed la kamparanoj, kiuj konsistigas plejparton de ĝia tuta loĝantaro, ne rajtas ricevi edukon. Sekve li iniciatis la kamparan edukon movadon. Marte de 1927 li, en kunlaboro kun alia entuziasmulo, fondis la Xiaozhuang-an Normalan Kolegion en Nanjing kaj elmetis tiajn sloganojn kiel "la socio estas lernejo", malfermante novan vojon por la ĉina eduka afero. Post kelkaj jaroj la kolegio prosperiĝis, kaj pligrandiĝis la influo de lia eduka penso en la tuta lando. Precipe nombro da revoluciaj gejunuloj de la kolegio aktive partoprenis en la brava batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kio konsternis la reakcian registaron. En aprilo de 1930 la kolegio estis fermita kaj multaj studentoj estis arestitaj aŭ buĉitaj. Ankaŭ Tao mem estas persekutata kaj devis fuĝi eksterlanden. Antaŭ la severa realo li fine komprenis, ke sub la regado de la reakcia registaro la ideo "savi la nacion per eduko" restas nur iluzio. En tiu tempo li ankaŭ ekvidis la eraron de la tezo de Wang Yangming pri kombino de kono kaj ago kaj komprenis, ke ago estas komenco de kono kaj kono estas fino de ago, t.e. la vera scio venas el praktiko. Kaj li ŝanĝis pro tio sian nomon Zhi-xing en Xingzhi. Tio montris lian salton en filozofio.

Post kiam la japanaj agresantoj kreis la Eventon de la 18-a de Septembro 1931, s-ro Tao revenis de Japanio al sia patrolando. Li firme staris por rezisto

kontraŭ Japanio kaj savo de la nacio kaj oponis al la kapitulacisma kaj naciperfida politiko de Ĉiang Kajšek. Vizaĝe al la serioza nacia krizo, li opiniis, ke plej grave estas unuigi la popolamasojn, ke ili sin defendu kaj emancipu per sia propra forto. Por tio li proponis starigi laborolernajn grupojn laŭ la praktika sperto de la Xiaozhuang-a Kolegio. Ili pledis por vivi el sia laboro. Koni la homan vivon per lernado kaj sin defendi per solidareco de la popolamasoj. Li fondis en Shanghai (Ŝanhajo) kelkajn tiajn grupojn.


Kiam eksplodis la studenta kontraŭjapana nacisava Movado de la 9-a de Decembro 1935, s-ro Tao kune kun aliaj patriotaj demokratoj de diversaj socitavoloj iniciatis la Tut-Ĉinian Kontraŭjapanan Nacisavan Federacion, varme respondis la alvokon de la Komunista Partio de Ĉinio por ĉesigo de enlanda milito kaj unuanima rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj kaj publikigis la nacisavan dek-



"Ekzemplo por Ĉiu Generacio", aŭtografo farita de Song Qingling dediĉe al la forpasinta s-ro Tao Xingzhi

laron, kiu apelaciis por unuigo kaj rezisto kontraŭ Japanio kaj oponis al naciperfido kaj kapitulaco. Samtempe s-ro Tao elmetis la sloganon "eduko dum la nacia katastrofo". Li unuigis vastajn amasojn de kulturaj kaj edukaj personoj kaj kombi-

S-ro Tao Xingzhi inter elementlernejanoj



nis edukon kun la tutlanda kontraŭjapana nacisava movado. En julio de 1936, komisiite de la federacio, s-ro Tao vojaĝis kiel popola sendito al eŭropaj, amerikaj, aziaj kaj afrikaj landoj por propagandi la kontraŭjapanajn vidpunktojn de la ĉina popolo, malkaŝi la agreson kaj perfortojn de la japanaj faŝistoj kaj gajni simpatiejon kaj helpon de transmaraj ĉinoj kaj alilandaj popoloj. S-ro Tao vizitis Brition, Francion, Usonon, Germanion, Italion, Nederlando, Meksikion, Egiption, Hindion, Cejlonon kaj aliajn 18 landojn. Ĉie, kien li iris, leviĝis tajdo kontraŭ la japana agreso al Ĉinio.

Aŭtune de 1938 s-ro Tao revenis al sia patrolando batalanta kontraŭ la japana agreso. Li diris, ke li faros tri aferojn: 1) fondi Xioazhuang-instituton por kulturi altajn klerulojn; 2) fondi en Hongkong la Ĉinan Postlaboran Klerigan Lernejon kun celo mobilizi per eduko la samlandanojn al la nacisava movado; kaj 3) fondi lernejon por geknaboj senhejmiĝintaj en la milito kaj elekti la plej kapablajn el ili por elkulturado. Post la falo de Wuhan (Vuhan),

s-ro Tao iris al Chongqing (Ĉongking) kaj fondis tie lernejon Yucai, kiu akceptis geknabojn senhejmiĝintajn en la milito. Pro la ĝenado de la kuomintangaj aŭtoritatoj, la lernejo, al kiu mankis mono, drojis en malfacila situacio. Sed helpate de diverstavolaj progresemuloj, s-ro Tao kun neŝancebla persistemo daŭrigis la lernejon.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1945, s-ro Tao aktive partoprenis en la paca kaj demokratia movado kontraŭ enlanda milito kaj diktatoreco. Ne timante perforton, li gvidis kaj eldonis la monatan gazeton "Demokratio kaj Eduko" kaj la semajnan revuon "Demokratio". En la printempo de 1946 li venis al Shanghai, kaj en la daŭro de nur tri monatoj li faris pli ol 100 paroladojn al diverstavolaj popolamasoj por alvoki pacon kaj demokration, kaj tio montris lian bravan heroismon.

La kuomintanga reakciularo brutale mortigis famajn ĉinajn patriotajn demokratojn Li Gongpu kaj Wen Yiduo. Ankaŭ la nomo de s-ro Tao estis en ilia nigra listo. Tiam liaj amikoj es-

tis tre maltrankvilaj pri lia sekureco, sed li diris kun sentimeco: "Mi atendas la trian pafon!" En sia lasta letero al la instruistoj kaj lernantoj de la lernejo Yucai, li diris: "Mi proponas venigi kaj kulturi 10,000 novajn demokratiajn batalantojn por replenigo de la loko postlasita de ĉiu demokratia martiro. . . Se ni nur volonte mortos pro demokratio, la vera demokratio venos kaj la ĉina nacio certe vivos senfine." Antaŭ la blanka teroro de Kuomintango s-ro Tao montris neniam da timo. Li laboregis ĝis plena elĉerpiĝo kaj mortis la 25-an de julio 1946 pro cerebra hemoragio.

Komence de decembro 1946, 53 ĉinaj popolaj organizoj okazigis solenan ceremonion por funebri pri li. Dum lia ĉerko estis transportata de Shanghai al Xioazhuang de Nanjing, kamparanoj junaj kaj maljunaj sur la vojo ploris de doloro, kun brulanta incenso en la mano.

Kvankam lia deziro kaj idealo ne realiĝis antaŭ lia morto pro limigo de sociaj kondiĉoj, tamen ĝia influo atingis malproksimen. La popolo ĉiam tenos lin en sia memoro.

(Daŭrigo de p. 22)

Fajfas la vento, frostas la rivera flu'.

Foriras la bravulo kaj jam ne revenos plu!

Tio estas 26 silaboj. Ni provu koncizigi la versajon:

De 1' vento fajf', glaci' rivera.
Reveno de 1' hero': himera!

Tio estas ankoraŭ 18 silaboj. La atingajo ne sufiĉas. Do denove:

La vento fajfas, frostas flu'.
Hero-reven': neniam plu!

Dek-ses silaboj. Ankoraŭ tro multaj. Postulata estas malpli ol la duono, do malpli ol dek-tri. Jen dek-du:

La vintron (=Dumvintre) frostas tro.

Jam mortis la hero'!

Sed ĉu tio estas ankoraŭ poezio, ĉu tiuj du versoj ankoraŭ iel prezentas la originalajn, estas almenaŭ dubinde. Cetere, ĉiu kiu esperantigis versojn, spertis saman malfacilecon. Mi mem esperantigante, kiam mi ne sciis eviti tion, senĝene plilon-

gigis la versojn. Mi do tiurilate el plena koro absolvas mian malproksiman Apolonecan kunfraton.

Kara leganto, ne forturnu vin! La libro enhavas multajn tre belajn, lingve kaj formale perfektajn versojn. Ankaŭ ilia enhavo estas plej ofte klara kaj facile komprenebla. Alian Esperantan aliron al la ĉina poezio ni apenaŭ havas. Tiu libro permesas al ni almenaŭ unuan kontakton kun io, kio vere meritas esti konata kaj ĝuata.


Recenzis RIKARDO SŬLCO
(FR Germanio)

Sur strato de Ruili

Fotoj de QU WEIBO


Ruili estas urbeto sudokcidente de Yunnan-provinco, Ĉinio. Ĝin trafluas Ruili-rivero. Tie estas milda klimato kaj ĉiam regas verdeco. Tie vivas taj-oj kaj ĝingpo-oj. En foiro kamparanoj vendas fruktojn, viandojn, legomojn, agrikulturaĵojn kaj aliajn produktaĵojn, kaj post tio ili aĉetas vivbezonojn. Ili parolas malsamajn lingvojn kaj portas diversajn vestojn, kio prezentas bildon de harmonio kaj bunteco.

En foiro







Aĉetantoj



Kiel plaĉa
katunpeco!



“Kiom kostas unu
fasko da freŝaj flo-
roj?”




Hejmenreveno
kun ĝojo

La Naskiĝtago de Ŝakjamunio

Budhistoj de Beijing (Pekino) festis la naskiĝtagon de Sakjamunio en la templo Guangji. Bonzo Zheng Guo prezidis la ceremonion. Pli ol 200 ĉinaj kaj alilandaj budhistoj ĉeestis ĝin kaj aŭskultis la recitaĵon de sutro.

Bonzo Zheng Guo
recitas sutron.






Bonzo Zheng Guo
en predikado




Budhistoj recitas sutron.



Eksterlandaj budhistoj en Bei-
jing en la ceremonio

«Ĉina Granda Enciklopedio» en Redaktado

de DENG YUAN



«Astronomio», unu el la 70 volumoj de «Ĉina Granda Enciklopedio»

EN la fino de 1980 «Astronomio» kun 1,500,000 ideografiaĵoj, unu el la 70 volumoj de tiu sin-teza enciklopedio estis eldonita. Kaj ĉiuj aliaj volumoj estas en redaktado aŭ presado. Ĉiu el ili havas meznombre ĉ. milionon da ideografiaĵoj. La tuta verko eldoniĝos post ĉ. 10 jaroj.

Tiu enciklopedio estas granda referenca libro redaktita en la formo de vortaro kaj kolekto de la sciencaj, kulturaj kaj historiaj scioj de la homaro. La «Ĉina Granda Enciklopedio» kolektos fundamentajn sciojn de diversaj fakoj kaj sferoj kaj estos redaktata en plej lakona kaj preciza lingvo.

Ĝi karakterizas sin per la socialisma Ĉinio. Ĉinio estas unu el la landoj de la mondo kiuj havas plej longan historion kaj plej riĉan kulturon, tial la enciklopedioj eldonitaj de diversaj landoj dediĉis multajn paĝojn al la artikoloj pri Ĉinio. Sed tiu enciklopedio pli komplete, pli detale kaj pli sisteme konigos la fundamentajn statojn de la ĉinaj geografio, historio, ekonomio, politiko, kulturo kaj aliaj flankoj, atingojn gajnatajn de la ĉina popolo en ĉiuj sferoj, la demokratian revolucion, la socialisman revolucion kaj konstruadon de Ĉinio. Tial ĝi helpas ne nur enlandajn legantojn, sed ankaŭ eksterlandajn legantojn pli bone koni Ĉinion.


Ĝenerale, enciklopedio havas en si multajn volumojn, kiam oni kompilas ĝin en la komenco. Ĝuste pro tio la unua eldono de la «Ĉina Granda Enciklopedio» havas 70 volumojn. Laŭ la nombro de siaj vortoj, ĝi estas preskaŭ egala, en grandeco, al la «Britia Enciklopedio» 15-afoje eldonita de Usono, kiu enhavas 30 volumojn, ĉiu kun 2,500,000 vortoj.

La «Ĉina Granda Enciklopedio» taŭgas ĉefe por nefakaj legantoj kun klereco de supermezlernejoj aŭ studentoj. Ekzemple, la volumo «Astronomio» sin taskas konigi fundamentajn sciojn de tiu fako ĉefe al vasta ordinara legantaro.

La laboro por redakti kaj eldoni iaspecan enciklopedion, ĉu en 20 aŭ 30 aŭ 50 volumoj, senescepte bezonas ĉ. 10 jarojn. Kiam la lastaj volumoj estas eldonitaj, la unuaj volumoj jam estas malnovaj enhance. Tiu fenomeno ekzistas ankaŭ en aliaj landoj. Por solvi tiun problemon, oni ĉiujare eldonas jarlibron

kiel suplementon, post kiam la enciklopedio estas fineldonita. Ekde 1980, la Eldonejo de la «Ĉina Granda Enciklopedio» jam eldonis la «Jarlibron de Ĉina Granda Enciklopedio», por akurate liveri al legantoj plej novajn sciencajn kaj kulturajn sciojn de diversaj fakoj. En tiu jarlibro troviĝas du artikoloj pri Esperanto, nome la Universala Esperanto-Asocio kaj la Ĉina Esperanto-Ligo.

La eldonejo aperigas ankaŭ monatan gazeton «Enciklopediaj Scioj». En ĝi estas fundamentaj scioj pri diversaj fakoj kaj materiaĵoj pri enciklopedio. Ĝi publikigas ankaŭ provartikolojn kaj kondukas diskutadon en si pri principoj, rimedoj k.a. en kompilado de enciklopedio. Tiu eldonejo planas traduki kaj eldoni en la daŭro de 4 jaroj 10 volumojn de la «Britia Enciklopedio» en mallongigo, kaj planas ankaŭ redakti, traduki kaj revizii fremdlandajn enciklopediojn por junuloj, knaboj, familioj kaj aliaj personoj.



La monata gazeto
«Enciklopediaj Scioj»

LA kvinan de novembro, 1980, en la Kvara Internacia Konkurso pri Violona Farado okazigita en Novjorko, ĉina violono kun fabrik-marko "Hongmian" gajnis oran medalon per 48 poentoj (la plenaj poentoj estas 50) post ripetada prijuĝo de diverslandaj kompetentuloj kaj severa mezurado per sciencaj aparatoj.

La medalita violono delikate kaj gracie farita kun abundaj lerte skulptitaj linioj donas dure altajn kaj penetrive klarajn sonojn. Ĝi havas ne nur la puran kaj teneran stilon de la antikva itala violono sed ankaŭ la brilan kaj klaran karakteron



Fronto de la ora medalo

de la nuntempa violono. Fremdlandaj amikoj laŭde nomis ĝin metiartaĵo de eminenta majstro.

La eminenta majstro estas neniu alia ol 51-jara Chen Jinnong

Chen Jinnong (la maldekstra) klarigas al sia filo la teknikan stilon de la itala violon-faristo majstro Stradivari.



CHEN JINNONG PREMITA PER

de la Guangdong-a Muzikila Fabriko. Li naskiĝis en laborista familio kaj laboris kiel ŝuisto antaŭ la Liberiĝo. En 1951, li eklernis fari violonon. Li estas silentema kaj milda, tamen li havas fortan volon bone mastrikion ajn li lernas.

Por fari violonon oni devas havi multajn fakajn sciojn pri ligno, akustiko, mekaniko kaj lakado, dume Chen Jinnong siatempe estis edukita nur en elementa lernejo. Por venki ĉiujn malfacilojn, krom peti helpon de specialistoj kaj teknikistoj, li diligente konsultis ankaŭ grandan kvanton da materialoj en la ĉina kaj fremdaj lingvoj. Li studis teorion, teknikon kaj ankaŭ la historion de violonfarado.

Violono jam havas historion de 400-500 jaroj. De la meza periodo de la 17-a jarcento ĝis la meza periodo de la 18-a, en Italio aperis nombro da elstaraj violonfabrikistoj, kiaj Stradivari kaj Guarneri. Ĉinio komencis imite fabriki popularajn violonojn nur antaŭ ĉ. 50 jaroj. En 1958, la ĉina Ministerio de Malpeza Industrio funkciigis en Shanghai (Ŝanhajo) tutlandan kurson pri fabrikado de altklasaj violonoj, kaj Chen Jinnong estis unu el la kursanoj. En 1975, iu teknikisto de la Guangdong-a Muzikila Fabriko elfaris la unuan ĉinan violonon kun fabrik-marko "Hongmian" por solludo. Sed, pro manko de interŝanĝo de tek-

KAJ LIA VIOLONO ORA MEDALO


de MAO JIZENG*

niko pri violon-farado inter Ĉinio kaj aliaj landoj, nemalmultaj eksterlandaj fakuloj opiniis, ke la teknika nivelo de la ĉinaj violonfarantoj estas ne pli alta ol tiu de lignaĵistoj.

Foje, iu fremdlanda amiko konigis en Guangdong (Kantonno) al Chen premiitan fremdlandan violonon. Chen atenteme pririgardis ĝin kaj faris decidon fabriki altklasan violonon por Ĉinio. El la de li kolektitaj materialoj troviĝas libro en la angla lingvo "Italaj Violon-fabrikistoj". Pro la lingva baro, li povis nur peti aliajn klarigi la ĉefan enhavon de la libro, poste li mem detale studis ĉiujn bildojn en la libro ĝis kiam li komprenis la esencon de la tuta libro.

Chen heredis la teknologion de la antikvaj italaj violonoj. Li aparte profunde studis la violonojn faritajn de Stradivari en 1722. Dum sia farado li ne estis katenita de tradiciaj rutinoj sed kuraĝis fari esplorojn kaj provojn. Li bone scias, ke fajna ligno, perfekta tekniko, konvenaj arkeco kaj dikeco estas la kvar bazaj kondiĉoj por fari altklasan violonon. Li donis apartan atenton al elekto de ligno kaj difinis la arkecon kaj dikecon de violon-tabulo laŭ malsamaj kvalitoj de ligno.

Chen mem ne scipovas ludi violonon, kio multe malhelpas lin levi sian violon-faran teknikon. Kun aĝo-kresko des pli



Dorso de la ora medalo

malfacile estas por li lerni violon-ludon, tial li proponis al sia filo lerni ludi violonon. Nun lia filo jam estas tre lerta en la ludo kaj rolas kiel la unua provludanto de ĉiuj liaj violonoj.

Chen havas ankaŭ virtan edzinon. Por la kariero de la edzo, ŝi faris sian kontribuon. Ŝi prenis sur sin la tutajn mastrumajn laborojn por ke la edzo tutkore laboru super violonfarado. Ŝin aparte ĝojigis la informo, ke Chen Jinnong gajnis premion. Pro tio ŝi speciale preparis


bonan vinon kaj bongustajn pladojn por li.


Ke violono kun fabrik-marko "Hongmian" gajnis oran medalon, tio inspiris ankaŭ la ĉinajn muzikistojn. Juna violonisto Hu Kun opiniis, ke Ĉinio akiris grandan progreson en la violonfara tekniko, la violonoj fabrikitaj de Ĉinio povas rivali kun la nuntempaj elstaraj violonoj de la mondo. La fama violonisto Sheng Zhongguo esperis uzi la violonon fabrikitan de sia patrio en la estonta prezentado eksterlande.

Sed Chen Jinnong restas ankoraŭ silentema. Pri kio li meditas? Ni estas certaj, ke li ne kontentiĝas pri siaj atingoj nek haltigos siajn paŝojn, sed faros per siaj propraj manoj violonon, kiu eligos la plej ĉarman sonon tra la mondo.

** La aŭtoro estas konsilanto de la Beijing-a Muzikila Instituto.*


Ĉinaj muzikistoj aprezas violonon faritan de Chen Jinnong.





IAMA OKAZIN- TAĴO

de OCTAVIAN GOGA*



Poeto Octavian Goga

*Pli kaj pli malofte sonas en la nokto ŝaftintiloj...
Nun — kvarope — ĉe la popo daŭras plu interkonsiloj.*

*Sur la tabl', en kandelingo, du kandeloj vaksaj lumas
Kaj zorgema, per la plumo, plendon skribe pop' plenumas:*

*“Estroj, kvar, el kvar vilaĝoj je Mureĝ' al flank' maldekstra
Kliniĝantaj obeeme al la Moŝt' Imperiestra*

*Kun malĝojo plendskribigas, ke forprenis al plimulto
La paŝtejon Grafa Moŝto, kontraŭleĝe, sen konsulto...*

*Estis ŝtonoj, ĉe la limoj, linsignoj antaŭulaj
Ekde kiam en ĉi-lando estis ni la mastroj nuraj...*

*Ne plu estas ili, ĉiujn la riĉulo detruigis,
Kaj li ankaŭ mizerulon Johaneton pereigis!*

*La brutar' surkorte mortas, kaj lamento laŭtas forte,
Moŝto Alta, kaj ne volas ni nin venĝi nun permorte!*

*Ni nur volas nian bonon, pro l' mortint' justecon volas!
De Moŝt' Via la servistoj, kiujn nur la just' konsolas,*

*Do sendigas ĉi leteron, kaj — aldone, je la scio —
Mi ĝin skribis, pop' Istrate, tagon de la Sankt' Elio.*

*Kaj ni, kune, la kvar estroj, sen kapabl' en skribafero,
Premas fingrojn sur krucsignon por konfirm' de l' plendletero.”*

*Tra l' fenestroj la tagiĝo pli kaj pli penetras enen,
Ankaŭ nun maldormas l' estroj, pripensantaj zorgoplene.*

*Eklumigas esperet' la kvar vizaĝojn sen kareso:
Pop' sigelis la karteton kaj surskribas la adreson.*

*Av' Istrate nun ekstaras kaj envolvas la paperon
Refaldante kortuŝite eĉ trioble la tukeron...*

*Je vojaĝ' vestite, prenas la leteron nun permone
Radu Rad', ekskaporalo; iom kleras li germane.*

*Kun la kart' ĉebruste. Radu kisas poste l' popan manon,
Kaj la lian premas l' estroj, bondezire al lontano.*

*Ekrosumas la okuloj ĉe sursojraj la restintoj,
Kiam, je Baston' apoge, dum vigliĝas ree tintoj,*

*Tra l' brileto de l' mateno la vilaĝon ruĝiganta
Radu Rad' foriras mondon kun leter' al Moŝt' Reganta.*

Esperantigita de CONSTANTIN DOMINTE

* OCTAVIAN GOGA (1881 — 1928), rumana poeto, ĵurnaliŝto kaj politikisto. Unu el la gvidintoj de la transilvania rumana revuo “Lucafarul” (La Vesperstelo), aperinta en la jaro 1902. Poezio romantike vizia, kun profetaj toncoj, de la sociaj kaj naciaj aspiroj, elvokinta la transilvanian vilaĝon dum la subpremado de la Habsburga Imperio. Poemaroj: “Pezajoj” (1905), “Nin Alvokas la Tero” (1909), “El la Ombro de la Muroj” (1913), “Senlandaj Kantoj” (1916), “El la Vasto”. Dramverkoj, literaturaj portretoj, gazetista verkado kaj tradukoj (precipe el la verkoj de la “hungaraj poetoj Petöfi, Ady, Madach). Liaj ĉefverkoj majstrece pruvis la eblecon altpoezie pritrakti politikajn temojn.

Sporto

LA 11-A MONDA STUDENTA SPORTKUNVENO EN BUKAREŝTO

En la lasta tagdeko de julio, la nomita sportkunveno okazis en Bukareŝto, la ĉefurbo de Rumanio.

5,000 homoj el proksimume 90 landoj kaj regionoj partoprenis en tiu grandioza sportkunveno simbollanta junecon, amikecon kaj pacon. Ili rompis ĉ. 50 rekordojn de la koncernaj ludoj kaj sportistoj de 31 landoj gajnis medalojn. La ĉinaj sportistoj atingis bonajn sukcesojn en la virina flugpilko, plonĝo, gimnastiko kaj atletiko. Ili gajnis sume 10 orajn, 6 arĝentajn kaj 5 kuprajn medalojn kaj okupis la kvaran lokon inter la landoj ricevintaj medalojn. Sovetunio, Ru-

manio kaj Usono okupis la unuan, duan kaj trian lokojn respektive.

SPORTAJ KONTAKTOJ INTER ĈINIO KAJ ALIAJ LANDOJ

Kiel membro de 38 mondaj kaj 20 aziaj sportaj organizoj, Ĉinio havas kontakton kun pli ol 120 landoj kaj regionoj. De la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝis la fino de 1980 ĉinaj sportistoj rompis sume pli ol 200 mondajn rekordojn kaj gajnis 57 mondajn ĉampionecojn. En la lastaj 2.5 jaroj ili gajnis pli ol 600 orajn medalojn en la internaciaj konkursoj.

Krome, Ĉinio sendis al 34 landoj pli ol 150 trejnistojn de tablotenis, volano, flugpilko, korbopilko, gimnastiko kaj aliaj sportbranĉoj. Tiuj trejnistoj kontribuas por akcelo de la amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj plifortigo de la interrilatoj kaj kunlaboro inter sportaj rondoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

UNUKRURA JUNULO FARIS LONGAN BICIKLAN VOJAĜON

Lu Lin, 23-jara unukrura laboristo de Huangshi, Hubei-provinco, bicikle vojaĝis al Beijing 1,600 kilometrojn en 19 tagoj.

Malgraŭ malsano, pluvego, varmego kaj krutaj deklivoj sur la vojo, li bicikladis po ĉ. 100 kilometrojn ĉiutage.

Antaŭ dek jaroj li estis grave vundita kaj lia dekstra kruro estis amputita je la loko de 16.5 cm. sub la gluteo. Ekde la lasta aŭtuno li konstante sin ekzercadis en longdistanca biciklado kaj bone sin preparis por tiu vojaĝo.

Antaŭ lia vojaĝo la hospitalo faris korpan ekzamenon por li, la koncernaj organizoj kaj iuj junaj amikoj donacis al li necesajojn kaj okazigis kunvenon por deziri al li bonan vojaĝon.



* S-ino Jolanda Jozsi, Str. Patinoarului 12, 4100 M. Ciuc, Rumanio, dez. kor. tutmonde.

* Korespondu kun mi, se vi bezonas aĉeti ludilojn, sportajn ŝuojn aŭ la literaturon de Jehovaaj Atestantoj. Pentti Tormala, Hevonselka, SF-07170 Pornainen, Finnlando.

* Ĉu vi bezonas sportajn ŝuojn? En nia lando produktiĝas famaj sportaj ŝuoj kun marko "Karhu" ("Urso", patentita en multaj landoj) kun speciala t.n. "aerkusena fundo". Se vi volas menditajn (por la diversaj sportaj

branĉoj) ĉe mi, vi povas pagi ankaŭ per konvenaj novaj varoj. Pentti Tormala, Hevonselka, SF-07170 Pornainen, Finnlando.

* Ni, kriplaj infanoj el Pollando, kiuj nun travivas ekonomian krizon, afable petas vin pri helpo en lernado de Esperanto per sendado de esperantaj fabeloj, libretoj kaj legajoj por infanoj. Ni estas kore dankemaj al ĉiuj helpantoj. Rekompencos per bildkarto, poŝtmarkoj kaj popolmemorajoj. Adreso: Waldemar Gasiar, ul. Cybulskiego 26/13, 50-205 Wroclaw, Pollando.

* "TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO" 1981 aperis! Ĉ. 2,700 adresoj el ĉ. 60 ŝtatoj, kun indikoj pri aĝo, profesio, hobiaj, grado de E-sciado, deziro korespondi, preteco gastigi. Tuj mendum ĝin ĉe vialanda libroservo!

* Ĉiu esperantisto, ĉiuj esperantistaj asocioj, societoj, entreprenoj ktp. aperigu siajn adresojn en Tutmonda E-a Adresaro! Tio kostos neniom al ili. Vi devas nur plenigi kaj resendi respondilon, kiun ni sendos al vi kontraŭ unu internacia rkp. Skribu al: Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

* Por-Esperanta Mormonaro estas mondskala organizo, kiu servas la tramondan Esperantistaron. Ni havas korespondservon kaj subtenas senpagan korespondkursaron. Haveblaj ĉe ni estas pluraj senpagaj broŝuretoj kaj faldfolioj en Esperanto. Aĉeteblaj pere de P-EM estas diversaj priprelegaj kasetoj en kaj pri Esperanto. Skribu bonvole! P-EM, 7222 University Station, Provo Utah, 84602, Usono.

La problemoj alfrontataj de la ekonomio de la disvolviĝantaj landoj

EN la lastaj jaroj la disvolviĝantaj landoj havis relative rapidan ekonomian kreskon. En la meza periodo de la sepdekaj jaroj la jara meznombra kresko de ilia totala nacia produkta valoro atingis preskaŭ 6% kaj superis tiun de la evoluantaj kapitalismaj landoj.

Sed ilia ekonomia disvolviĝo estis tre malekvilibra. Laŭ la statistiko de UNO pri 96 disvolviĝantaj landoj kaj regionoj, en la tempo de 1971 ĝis 1977 la ekonomio de 30 landoj kaj regionoj disvolviĝis rapide kaj ilia jara kresko de ekonomio superis 6%; la ekonomio de 20 landoj kaj regionoj disvolviĝis mezrapide kaj ilia jara kresko de ekonomio estis 4-6%; la aliaj 46 landoj kaj regionoj ekonomie disvolviĝis malrapide, iuj el ili havis jaran ekonomian kreskon de malpli ol 1% kaj la ekonomio de iuj landoj eĉ malkreskis. Se oni kalkulas la jaran ekonomian kreskon de tiuj landoj kaj regionoj meznombro laŭ ilia loĝantaro, ilia diferenco en la ekonomia disvolviĝo estis eĉ pli okulfrapa.

Estis rimarkinde, ke tiuj landoj, kies ekonomia kresko estis pli rapida, plejparte antaŭe jam havis relative altan nivelon de ekonomia disvolviĝo (la meznombra enspezo de iliaj loĝantoj superis 800 usonajn dolarojn); kaj tiuj landoj, kies ekonomio disvolviĝis malrapide kaj eĉ stagne, plejparte antaŭe havis malaltan nivelon de ekonomia disvolviĝo kaj estis malriĉaj kaj postigantaj landoj (la meznombra enspezo de iliaj loĝantoj es-

tis malpli ol 300 usonaj dolaroj). Tio montris, ke la diferenco de ekonomia disvolviĝo inter la disvolviĝantaj landoj ĉiam pli grandigis. Inter la landoj, kies enspezo pliiĝis rapide, krom la petrolproduktaj landoj, troviĝas Malajzio kaj Singapuro en la sudorienta Azio, Gabono kaj Eburio en Afriko, Argentino, Brazilo kaj Meksikio en Latin-Ameriko. En tiuj landoj la ekonomio fariĝas ĉiam pli diversa, la manufaktura industrio havas relative grandan disvolviĝon, la teknika kaj administra nivelo leviĝas senĉese, la eksporto plifortiĝas certgrade kaj iuj manufakturaĵoj de ili havas certan konkurencon kapablon en la internacia merkato. Tiuj landoj, kies ekonomio disvolviĝas malrapide, plejparte troviĝas en Afriko kaj la suda Azio. En tiuj landoj la proporcio de la industrio en la totala produkta valoro de la nacia ekonomio estas malpli ol 10%, la enlanda akumulo de kapitalo kaj la eksporta kapablo estas tre malgrandaj kaj la popolo vivas mizere. La ekonomia disvolviĝo de la landoj en du kategorioj prezentis akran kontraston.

La ekonomia disvolviĝo de la disvolviĝantaj landoj estas en malsamaj statoj, sed ili ĉiuj alfrontas serion da komunaj malfaciloj kaj problemoj, ĉefe jenaj:

1. La agrikulturo estas subevoluinta kaj mankas al ili greno. Statistiko de UNO montris, ke en la jaroj de 1971 ĝis 1977 la agrikultura produktado de 46 el 95 disvolviĝantaj landoj kaj re-

gionoj meznombro pliiĝis jare malpli ol 2.5% kaj tiu de 29 landoj kaj regionoj malpli ol 1%. Sed la meznombra jara kresko de la loĝantaro de la disvolviĝantaj landoj estas ĉ. 2.5%.

2. Tri kvaronoj de la ekstera komerco de la disvolviĝantaj landoj estis faritaj kun evoluantaj kapitalismaj landoj. Ĉar senĉese leviĝis la prezoj de manufakturaĵoj importitaj de ili dum la prezoj de iliaj eksportitaj krudaj materialoj ofte estis maltigitaj, la kondiĉoj de ekstera komerco de pli multaj disvolviĝantaj landoj malboniĝis senĉese. Tio kaŭzis al ili seriozan perdon.

3. Preskaŭ ĉiuj disvolviĝantaj landoj, escepte de la petrolproduktantaj landoj, devis importi petrolon pro manko de energiaj rezervoj. Ekde 1973 tiuj landoj ĉiujare devis multe elspezi por tio pro grandskala altiĝo de petrolo prezo.

4. Multaj disvolviĝantaj landoj povas akumuli nur tre malmulte da kapitalo enlande pro granda deficito en la ekstera komerco kaj devas dependi certgrade de fremdlanda kapitalo. Rezulte de tio ilia ekstera ŝuldo estas tre granda. Oni taksis, ke la totala ekstera ŝuldo de la disvolviĝantaj landoj jam atingis 450,000,000,000 usonajn dolarojn. En 1977, la ekstera ŝuldo de dek landoj superis 50% de ilia nacia produkta valoro, kaj 8 el ili ĉiujare devas foruzi por ekstera ŝuldo pli ol 20% de sia enspezo de eksportado.

5. La ekonomio de nemal-multaj disvolviĝantaj landoj estas serioze influita de la ŝanĝiĝoj en ekonomio kaj merkato de la okcidenta mondo pro troa dependo de la internacia merkato kaj disvolviĝis tre malstabile. En la lastaj du jaroj, influate de la kapitalisma ekonomia depresio ilia ekonomia disvolviĝo malrapidiĝis okulfrape, ilia ekonomia kresko malleviĝis de 4.2% en 1979 al 3.6% en 1980.

6. Influate de la monda inflacio kaj pro la enlanda financa malfacilo, senĉese leviĝis la prezoj de plejmulto de la disvolviĝantaj landoj. La leviĝ-skalo de iliaj prezoj ĝenerale superis duoblon de tiu de la evoluintaj kapitalismaj landoj. Ekde la sepdekaj jaroj la prezoj de iliaj konsumaj varoj leviĝis je pli ol 20% meznombro en ĉiu jaro kaj eĉ je 32.6% en 1979, kaj tiuj de la disvolviĝantaj landoj sen petrola produktado leviĝis meznombro je 36.5%.

7. La diferenco en riĉeco inter la loĝantoj en la disvolviĝantaj landoj estas tre granda: malmultaj loĝantoj estas tre riĉaj, sed grandnombraj enspezas malmulte kaj vivas en malriĉeco. En la suda Azio 520,000,000 loĝantoj vivas en malsatego, tiaj loĝantoj malriĉegaj superis la nombron de 100,000,000 respektive en Afriko kaj Latin-Ameriko. La granda diferenco de enspezo estas por iuj landoj grava kaŭzo de socia malstabileco.

Pro tiuj malfaciloj kaj problemoj, iuj instruituloj kaj famekonataj personoj de la disvolviĝantaj landoj komencis pensi, kio estas vera disvolviĝo. Iuj opinias, ke disvolviĝo devas signifi ne nur ekonomian disvolviĝon, sed ankaŭ bonon por

la ordinaraj loĝantoj. Kaj iuj emfazis, ke la disvolviĝo devas antaŭ ĉio elimini malriĉecon.

En la okdekaj jaroj nova impeto de ekonomio aperos en la disvolviĝantaj landoj, precipe en tiuj landoj, kies ekonomio jam akiris relative grandan sukceson, kaj iliaj pozicio kaj rolo en la monda ekonomio estos certe plialtigataj. Sed ĝenerale oni opinias, ke en la okdekaj jaroj la tuta ekonomio de la Okcidento malfacile eliros el la marĉo de stagneco kaj inflacio. Tio alportos al la disvolviĝantaj landoj tre malbonan influon. Antaŭ ĉio, la pliintensiĝo de la monda inflacio igos la disvolviĝantajn landojn pagi pli multe por importi manufakturaĵojn; due, la evoluintaj landoj praktikos protektismon pro sia malrapida ekonomia disvolviĝo, la disvolviĝantaj landoj renkontos pli multajn malfacilojn en eksportado; trie, la petrola prezo leviĝos daŭre, multaj disvolviĝantaj landoj devos multe pagi por importi petrolon; kvare, la evoluintaj landoj kredeble reduktos registaran monhelpon al la tria mondo; kvine, pro alta interezo la disvolviĝantaj landoj devos pruntepreni monsumojn de privataj bankoj je pli alta interezo; kaj sese, se okazos grena krizo en la mondo, plimulto de la disvolviĝantaj landoj ricevos novan seriozan baton. En tia situacio, ja estos malfacile realigi la normojn de disvolviĝo en la okdekaj jaroj difinitajn de UNO por la disvolviĝantaj landoj (la totala enlanda produkta valoro ĉiujare kreskos meznombro je 7% kaj la meznombra enspezo de ĉiu loĝanto kreskos je 4.5% ĉiujare). Multaj disvolviĝantaj landoj estas resumantaj la sperton kaj lecionojn akiritajn en la pasinteco kaj se-

riozes esplorantaj efikan strategion de disvolviĝo por prilabori mezlongtempan aŭ longtempan planon de disvolviĝo.

La disvolviĝantaj landoj vidas ĉiam pli klare, ke por disvolvi sian socian ekonomion, ili antaŭ ĉio devas praktiki la principon apogi sin sur la propraj fortoj, plene utiligi la naturan rezervon de sia propra lando kaj dependi de sia propra popolo; kaj samtempe plifortigi la kunlaboron inter la disvolviĝantaj landoj. Iuj internaciaj kunlaboraj organizoj de disvolviĝantaj landoj jam akiris, en solidara kunlaborado de la membro-landoj, certan sukceson. En la estonteco la kunlaboro de la disvolviĝantaj landoj en kapitala transdono, energiaj rezervoj, greno kaj agrikulturo, komerco, trafiko kaj tekniko ricevos pli vastan disvolviĝon.

La disvolviĝantaj landoj kune batalas por konstrui novan internacian ekonomian ordon. En la okdekaj jaroj ili plifortigos tiun batalon kontraŭ la ĉiam pli intensa komerca protektismo, por akiri pli avantaĝajn komercajn kondiĉojn, stabiligi la prezojn de krudaj materialoj, redukti la influon de la serioza monda inflacio, akiri, laŭ sia propra bezono de disvolviĝo, privatatan kapitalon kaj teknikon de aliaj landoj, akiri pli multan registaran monhelpon de la evoluintaj kapitalismaj landoj, malpezigi la ŝuldo-ŝarĝon, limigi kaj kontraŭbatali tiujn aktivecojn de transnaciaj kompanioj damaĝantajn iliajn ekonomiajn interesojn. Ilia batalo sendube renkontos malhelpon de internaciaj monopolaj kapital-klikoj k.a., sed ĝi konforma al la historia tajdo kaj la popolaj interesoj certe disvolviĝos plue kaj venkos finfine.




“LONGA NAVIGADO DE SINDBAD”

de CAI XIANSHEG kaj MA SHENG

KARA amiko, ĉu vi legis la mondfaman verkon “Mil kaj Unu Noktoj”? En ĝi estas rakonto pri araba antikvulo Sindbad, kiu longe vojaĝis per ligna velŝipo trans oceano kaj atingis la urbon Guangzhou (Kantono) de Ĉinio. Kaj post pli ol mil jaroj, je la 11-a de julio ĉijare, ĉ. mil personoj el diversaj rondoj varme bonvenigis sur kajo de la nomita urbo la nuntempajn “Sindbad-ojn”. La gastoj veturis el Omano per la velŝipo “Sohar” laŭ la vojo irita de Sindbad, alportante la amikecon de la omana popolo. Oni nomas tiun vojaĝon “longa navigado de Sindbad”.

La velŝipo “Sohar” de Omano veturas al la havenurbo Guangzhou sub la eskorto de kanonŝipo de la Ĉina Mararmeo.



La rakonto pri Sindbad ĉarmas la tutan mondon per sia streĉa intrigo kaj profunda signifo. Laŭ esploro de omanaj ekspertizistoj, ĝi baziĝas sur aventuro de antikva omana mara vojaĝisto Abu Obide, kiu naskiĝis en la havenurbo Sohar en nordorienta Omano, tial oni donis al la ŝipo tiun nomon.

Por pruvi la verecon de la rakonto kaj montri denove la tradician amikecon inter la araba kaj ĉina popoloj, oni faris la ŝipon “Sohar” imite al antikvaj arabaj komercaj ŝipoj, ĉu strukture aŭ forme. Ĝi estas 87.6 futojn longa kaj 21 futojn larĝa. Por ĝin kons-

trui, oni ligis lignajn tabulojn nur per palmofibraj ŝnuregoj kaj ŝtopis intertabulajn fendojn per gumo. Sur la tuta ŝipo ne troviĝas najlo, nek aparato nek motoro. Oni devis observi stelojn por sin orienti kaj irigi la ŝipon helpe de vento.

MALFACILA VOJAĜO

20 ŝipanoj estis sur “Sohar”, kun la fama 40-jara maraventurulo Tim Severin kiel kapitano. La ŝipo ekvelis ĉe la omana ĉefurbo Maskato je la 23-a de novembro 1980, transiris la Hindan Oceanon, preterpasis Hindion, Sri-Lankaon kaj Sumatron, tra la Malaka Markolo kaj trans la Suda Ĉina Maro, kaj fine atingis Ĉinion. Ĝi veturis 9,600 kilometrojn en 216 tagoj, travivante multajn malfacilegojn.

Dum la vojo de Kolombo al Sumatro estis nenia blovo kaj la ŝipo iris tre malrapide. Tiel la vojaĝo daŭris du monatojn, duone malpli frue ol la plano. Kaj pro tio mankis al la ŝipanoj manĝaĵo kaj dolĉa akvo. Ilin minacis malsato kaj soifego. La 15-an de marto, la ŝipo estis ĉirkaŭatakata de ŝarkoj. Venis al ili bona ŝanco por ĉaso. Komenciĝis lukto inter homoj kaj fiŝoj. Post kvaronhoro, kuŝiĝis sur la ŝipo 15 mortaj ŝarkoj po 17-18 kg. La bravuloj satmanĝis. La restajn ili sunumis. Seka ŝarkoviando fariĝis ilia ĉefa nutraĵo dum la sekvantaj tagoj en la vojaĝo.

Kiam “Sohar” proksimiĝis al Sumatro, subita ventego rompis la

horizontalan stangon de la ĉefa velo sur la ĉefmasto. Ĝi forte balanciĝis kaj kirligis. Riskante sian vivon, la ŝipanoj grimpis sur la maston, malhisis la ĉefan velon kaj hisis la mezan. Ili batalis kontraŭ ventego kaj ondego tutan diurnon kaj fine eldanĝerigis.

Sur la Suda Ĉina Maro la ŝipon trafis uragano kun rapideco de 75 marmejloj ĉiuhore. Kvar veloj estis difektitaj en du horoj kaj la ŝipanoj refoje frontis la Sirenon, ili jam ne povis regi sian ŝipon. Sed neniu el ili timis. Ili rapide riparis la velojn kaj daŭrigis la vojaĝon.

ĜOJO DE TRIUMFO

La 28-an de junio ĉijare, ĉe supro de masto ŝipano Saiyid ekvidis tra nebulpluvo marbordon de Ĉinio. Tion li tuj informis al siaj kolegoj. Ili tre ekscitiĝis, ne povante sin deteni de larmoj. Ili svarmiĝis kriante: "Dankon al Alaho! Ni vidas la landon, kiun vizitis niaj prapatroj!" Ili kantis kaj dancis kaj hisis la nacian flagon de Ĉinio sur la masto.

Posttagmeze de la 29-a de junio, ĉinaj oficistoj faris kontakton kun "Sohar" kaj sendis trenŝipon sub pluvego por ĝin piloti. Renkontiĝis la du ŝipoj kaj la maristoj de ambaŭ landoj forte manpremis unu alian.

"Sohar" atingis la havenurbon Guangzhou. Ĉinaj oficistoj kaj polojanoj salutis la gastojn kaj trovis kun miro, ke tia ligna velŝipo post longa vojaĝo restis sendifekta. Ili admiris la saĝon de araboj.

Kiam la gastoj restis en la urbo, ili ricevis varman akcepton de ĉinoj. Ili vizitis muzeon kaj vidis tie modelon de ĉina antikva velŝipo kaj ankaŭ mapon de akvoĵo, malfermita en la 5-a jarcento, inter Guangzhou kaj la Araba Duoninsulo. Ili pilgrimis al la Profetmemoriga Moskeo konstruita de arabaj komercistoj dum la jaroj 627-649 p. K. en Tang-dinastio de Ĉinio. Ili vizitis kun respekto la tombon de araba antikvulo Vangas,

La omanaj amikoj bonvenigataj ĉe la havenurbo



Omanaj amikoj vizitas muzeon en Guangzhou.



kiu la unua enkondukis Islamon en Ĉinio. "Mi rimarkis kun surprizo." diris Khamis, asistanto de la kapitano, "ke la moskeo kaj la tombo konstruitaj antaŭ 1.300 jaroj estas en tiel bona konservado hodiaŭ. Tio estas simbolo de tradicia amikeco inter la araba kaj ĉina popoloj."

AMIKA RENKONTIĜO

La 11-an de julio, la registaro de Guangdong-provinco kaj Guangzhou-aj popolanoj okazigis solenan ceremonion por bonvenigi la gastojn.

Duonon post la sesa antaŭtagmeze, kondukata de ĉina trenŝipo kaj eskortata de kanonŝipo de ĉina mararmeo, "Sohar" kun la naciaj flagoj de Omano kaj Ĉinio sur la mastoj ekveturis malrapide al la ceremoniejo. La gastoj estis tre ĝojaj. Ili ekfrapis longan tamburon kaj ekkantis kantojn antikvajn kaj nove verkitajn. En la Perla Rivero ĉiuj ĉinaj ŝipoj preterpasantaj salutis ilin per sonigo de sireno.

Duonon post la naŭa horo, kiam la gastoj atingis la ceremoniejon, ĉ. mil ĉinoj svingis bukedojn.

Flirtis koloraj rubandoj, prezentigis ĉinaj tradiciaj leonaj dancoj, krakis petardoj, bruis tamtamoj kaj tamburoj kaj sonis arabaj klasikaj muzikaĵoj. La ceremoniejo estis plena de varma atmosfero. Kiam la gastoj albordegis, ilin bonvenigis Liu Tianfu, provincestro de Guangdong, Huang Zhen, prezidanto de la Komisiono por Kulturaj Rilatoj de Ĉinio kun Fremdaj Landoj, kaj aliaj ĉinaj oficistoj kaj Faisal, ministro de Omano, kiu venis speciale por la ceremonio, kaj Subhi, omana ambasadoro al Ĉinio.

La ambasadoro improvize deklamis poemon verkitan de li dediĉe al la "Longa Navigado de Sindbad":

*Sekvante l' antikvulojn la junaj
venas al Ĉinio,*

*La glor' pasinta brile direktas ilin
al la foro.*


*Profundan amikecon ili kunportas
al la ĉin-popolo,*

*Kiu ĉiam kreskas kaj eternas kiel la
naturo.*

*Gigantan ponton ili konstruas kun
firm-energio,*

*Por ligi ambaŭ popolojn tra gene-
racioj,*

La 13-an de julio 1981, "Sohar" adiaŭis Guangzhou kaj estis portata de omana militŝipo por reveni al sia lando. Ministro Faisal diris, ke ili metos "Sohar" en muzeon por ke ilia popolo kaj la posteuloj ĉiam memoru tiun novan simbolon de amikeco inter Ĉinio kaj Omano.



GIGANTA KNABINO

EN la gubernio Yuanjiang de Hunan-provinco de Ĉinio troviĝas 17-jara knabino Zeng Jinlian kun alteco de 2.4 metroj. Ŝi estas la plej alta virino, jam konata en Ĉinio.

Kvar monatojn post sia naskiĝo Zeng kreskis rapidege. En 1977, kiam ŝi estis 13-jara, ŝi atingis la altecon de 2.15 metroj. Nun ŝi, 147 kilogramojn peza, estas fortega. Ŝi lernas diligente, tre ŝatas legi kaj amas pentri kaj versi. Ŝi diris, ke

kvankam altega, ŝi sentas sin neniom malbone.

ELEKTRIZOLULO

EKZAMENATE de la Qinghai- (Kinghai)-a Medicina Instituto de Ĉinio, Li Yao, laboristo de la urbo Xining (Hining) de Qinghai-provinco, tuŝis per siaj dik- kaj montro-fingroj la pozitivan kaj negativan polusojn kun 220-volta elektro, kiun li tamen ne sentis. La rigardantoj miregis, kaj unu el ili kaptis lin je lia mano kaj ne estis frapita de elektro.

Post ekzamenado oni trovis, ke la rezistanco de liaj manoj, kubutoj, ventro, dorso kaj gamboj estas ĉ. unu megomo, kaj ĉiuj liaj korpopartoj, escepte de liaj vizaĝo kaj suroj, povas elteni la tension de maksimume 250 voltoj.

"FAJRA" BEBO

EN la urbo Mianyan de Sichuan-provinco troviĝas tia knabino, kies nuda korpo estas tre varma eĉ en frosta vintro, kaj pro tio oni nomas ŝin "fajra" knabineto.

La "fajra" bebo nomata Wu Xiaoli naskiĝis en aŭgusto de 1979. Ŝi kreskas normale kiel la ordinariaj infanoj, sed strange, ŝi ne portas vestojn en la tuta jaro kaj dormas nude sur mato, ĉar ŝi amas malvarmon anstataŭ varmon. En la someraj tagoj oni devas tralavi ŝin per malvarma akvo en ĉiu kvara aŭ kvina horo, alie ŝi fariĝas maltrankvila kaj multe malpacienca. Kiam oni vestas ŝin, ŝi tuj malbonhumoriĝas kaj ŝiaj kruroj ruĝiĝas kaj ŝveliĝas. Tial oni povas nur lasi ŝin esti nuda en ĉiu tempo.

Celebrante la 100-jaran jubileon de la
naskiĝo de la fama ĉina literaturisto
LUSIN (1881—1936)

“El Popola Ĉinio” ĵus eldonis en Esperanto
novan libron de LUSIN

MATENAJ ELOROJ KOLEKTITAJ EN VESPERO

Kolekto de dek eseoj

(10-Es-1387P)

120 × 186mm. 164 paĝoj broŝurita ilustrita
prezo: £0.45 US\$0.90



Ĵus aperinta romano de Yang Mo, ĉina verkistino

KANTO DE JUNECO

La Unua Parto

La romano priskribas zigzagan kaj kortuŝan historion de
juna studentino en la malnova Ĉinio

Esperantigita de Yang Yongsen Ilustrita de Hou Yimin

(10-Es-605P)

130 × 184mm. 312 paĝoj broŝ. kun ilustraĵoj k mapo
prezo: £1.90 US\$3.90

Mendu ĉe:

Libroservo de UEA


Peranto de EPC

aŭ

Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio





EL ĈINA MODERNA HISTORIO

KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO

(II)

de ZHANG BAOGUI

STARIGO DE BATALEJO EN LA LIBERIGITAJ REGIONOJ

Post la komenco de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la Centra Komitato de KPC kunvokis la plivasigitan kunvenon de la politika buroo en la 25-a de aŭgusto de 1937 en Luochuan de norda Shaanxi-provinco. La kunveno prezentis la ĝustan proponon de tutlanda rezistado, aprobis la faman Dek-punktan Kontraŭjapanan kaj Nacisavan Programon,* faris rezolucion pri mobilizo de la popolamasoj en la postfronto de la malamiko, pri disvolvo de gerila milito, pri malfermo de batalejo en la postfronto de la malamiko kaj pri fondo de kontraŭjapanaj bazlokoj.


Post la kunveno tri divizioj de la Oka-voja Armeo ekiris de

Shaanxi-provinco trans Huangheriveron (Flava Rivero) kaj marŝis al la fronto de norda Ĉinio por fari gerilon en nordorienta kaj nordokcidenta Shaanxi-provinco kontraŭ la japanaj agresantoj. Trupo de la Oka-voja Armeo faris operacion ĉe Pingxingguan kaj ekstermis pli ol 3,000 armeanojn de la elitaj japanaj divizioj de Itagaki. Tio estis la unua venko de la Oka-voja Armeo en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tuj poste la Oka-voja Armeo faris embuskon en Yanmenpasejo kaj detruis 500 militaŭtojn de la japana armeo, surprizatakis nokte la aerodromon de Yangmingbao kaj forbruligis 24 malamikajn aviadilojn. Ĉiuj ĉi venkoj ege levis la memfidon de la armeo kaj popolo de la tuta lando al la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito. En

novembro de la sama jaro la ĉefaj fortoj de la 115-a Divizio de la Oka-voja Armeo transiris al suda Shaanxi-provinco, dume ĝia vicestro Nie Rongzhen, komandante 2,000 militistojn, restis en Wutai-montregiono nordoriente de la sama provinco. Tie li vaste mobilizis la popolamasojn, organizis gerilajn trupojn kaj kontraŭjapanajn amasajn asociojn, kaj starigis la Shanxi-Chahar-Hebei-an Limregionan Bazlokon kaj ties popolan kontraŭjapanan regpotencon. Jen naskiĝis la unua kontraŭjapana bazloko. Samtempe kun tio la 120-a Divizio fondis la Kontraŭjapanan Bazlokon de Nordokcidenta Shaanxi, la 129-a Divizio fondis la Shanxi-Hebei-Shandong-Henan-an Kontraŭjapanan Bazlokon kun Taihang-montaro kiel sia centro. En oktobro de 1938 fondiĝis la Shandong-a Kontraŭjapana Bazloko en norda Ĉinio. En printempo de 1938, la Nova Kvara Armeo eniris en la batalejon en la postfronto de la malamiko, kaj entreprenis gerilan militon ĉe ambaŭ bordoj de Changjiang (Jangzi)-rivero kaj starigis la Centra-ĉinian Kontraŭjapanan Bazlokon.

En junio de 1938 Mao Zedong publikigis sian gravan verkon «Pri Longdaŭra Milito», en kiu li montris ke la ĉina kontraŭjapana milito estas longdaŭra, nepre devas trairi tri etapojn — strategian defensivon, strategian interdetenadon kaj strategian ofensivon. En la unua etapo la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj detenis pli ol 300,000 japanajn armeanojn dank' al la gerilo en la postfronto de la malamiko. Tial la japana armeo perdis

Trupo de la Oka-voja Armeo marŝas al fronto.



fortojn daŭre antaŭenmarŝi post konkero de Guangzhou (Kantono) kaj Wuhan (Vuhan) kaj devigite ĉesigis sian atakon sur la fronta baltalkampo de Kuomintangoj kaj tiel sin turnis al la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj, kio markis ke la Kontraŭjapana Rezistmilito eniris en la strategian interdetenadon.


TRI KONTRAŬKOMUNISTAJ ALTAJDOJ LEVITAJ DE KUOMINTANGO

En la etapo de la strategia interdetenado de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la japanaj imperiistoj prenis novan politikon kontraŭ Kuomintangoj, t.e. ĉefe allogi ĝin al kapitulaco en politiko kaj krome ataki ĝin per batalo, intencante per tio spliti la kontraŭjapanan fronton. Rezulte de tio, la kliko de Wang Jingwei en Kuomintangoj publike kapitulacis al la malamiko, kaj Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) praktikis la politikon "pasive batali kontraŭ Japanio kaj aktive oponi kontraŭ la komunistoj" kaj trifoje levis kontraŭkomunistajn tajdojn de vintro de 1939 ĝis somero de 1943.

De decembro de 1939 ĝis marto de 1940 Kuomintangoj levis la unuan kontraŭkomunistan tajdon. Jiang ordonis siajn proprajn trupojn ataki la Shaanxi-Gansu-Ningxia-an Limregionon regatan de la Kompartio de Ĉinio kaj la ĝeneralan stabebjon de la Okavoja Armeo en la Taihang-a montregiono. Kaj samtempe la Kuomintangaj lokaj trupoj en Shanxi faris atakon al la Kontraŭjapana Mortodefia Taĉmento gvidata de KPC en Shanxi-provinco. Persistante en la principo de memdefendo, la Oka-voja Armeo forte repuŝis la atakon de Kuomintangaj trupoj kaj frakasis la unuan kontraŭkomunistan militagadon de Kuomintangoj.

En oktobro de 1940 Kuomintangoj levis la duan kontraŭkomunistan tajdon. Ĝia milita komisiono arbitre ordonis la Oka-vojan kaj Novan Kvaran Armeojn garnizo-

Skiza mapo de la kontraŭjapanaj bazlokoj en la postfronto de la malamiko (1937-1940)



- | | | |
|--|------------------|-------------------|
| 2. Yan'an | 11. Jinan | 17. Shenyang |
| 3. Xi'an | 12. Shandong | 18. Bohai-mar |
| 5. Datong | 13. Xuzhou | 19. La Flava Maro |
| 6. Taiyuan | 14. Centra Ĉinio | 20. Zhengzhou |
| 9. Beijing | 15. Nanjing | 21. Hankou |
| 10. Tianjin | 16. Shanghai | 22. Wuchang |
| 1. Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Limregiono | | |
| 4. Shanxi-Suiyuan-a Kontraŭjapana Bazloko | | |
| 7. Shanxi-Hebei-Shandong-Henan-a Kontraŭjapana Bazloko | | |
| 8. Shanxi-Chahar-Hebei-a Kontraŭjapana Bazloko | | |

nantajn sude de Huanghe-rivero retiriĝi norden de la rivero en unu monato kaj plue reduktiĝi de 500,000 ĝis 100,000 homoj. Por eviti la splitiĝon de la Kontraŭjapana Unuecfronto KPC konsentis tiri parton de la Nova Kvara Armeo norden de Changjiang-rivero. La 5-an de januaro de 1941 Ye Ting kaj Xiang Ying komandis pli ol 9,000 armeanojn de la armestabo moviĝi norden trans Changjiang-riveron. La 7-an de januaro kiam la trupo de la Nova Kvara Armeo atingis la regionon Maolin de Jingxian-gubernio de Anhui-provinco, ili estis surpriz-

atakitaj de la embuskantaj kuomintangaj trupoj kun pli ol 80,000 soldatoj. La komandantoj kaj batalantoj de la Nova Kvara Armeo faris akran batalon kontraŭ la kuomintangaj trupoj sep diurnojn kaj fine, kaŭze de malsupereco de la fortoj kaj elkonsumiĝo de municio kaj provianto, plejparto de ili heroe oferis sian vivon, kaj nur ĉ. mil homoj rompis la sieĝon. La armeestro Ye Ting estis kaptita. Tio estis la mondsdua "Evento de Suda Anhui". La 20-an de januaro, tuj post la evento la Revolucia Milita Komisiono de la Centra Ko-

mitato de KPC donis ordonon de nove organizi la Novan Kvaran Armeon, nomumante Chen Yi kiel ĝian agantan armeestron por daŭre gvidi la 90.000-personan armeon en rezistado ambaŭborde de Chang-jiang-rivero. Samtempe la proparolanto de KPC malkaŝis la kontraŭ-komunistan intrigon de Kuomintang kaj postulis puni la ĉefajn krimulojn. Forte rebatita de KPC kaj premata de la en- kaj eksterlanda publika opinio, Jiang Jieshi devigite faris garantion en la kunveno de la Nacia Politika Konsilantaro kunvokita en marto, ke "estonte neniam estos militagado celanta ĉirkaŭekstermi la Komunistan Partion".

La konstanta kresko de la fortoj de la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj kaj konstanta ekspansio de la kontraŭjapanaj bazlokoj ege maltrankviligis Jiang Jieshi, kaj tiu ĉi faris en 1943 trian kontraŭkomunistan tajdon. Jiang ordonis centmilojn da armeanoj ĉirkaŭi la Shaanxi-Gansu-Ningxia-an Limregionon, por "fulme surprizi Yan'an", "neniigi la limregionon kaj venki la Komunistan Partion". En tia situacio la armeo kaj popolo de la limregiono aktive preparis sin al batalo, kaj samtempe ĉiuj demokratiaj partioj kaj la tutlanda popolo tutforte oponis kontraŭ la fiago de Kuomintang, Jiang Jieshi malvolonte ĉesis en sia tria agado kontraŭkomunista.

KONTRAŬBALAA Batalo de la Armeo kaj Popolo en Liberigitaj Regionoj

Komence de la kvara jardeko, por fari novan militan aventuron en la pacifika regiono, la japanaj imperiistoj decidis fari nordan Ĉinion la bazo de sia armeo, tial ĝi koncentris pli ol 60% de siaj trupoj agresantaj Ĉinion por fari grandskalan "balaadon" al ĉiuj kontraŭjapanaj bazlokoj. De 1941 ĝis 1942, en norda Ĉinio la japanaj agresantoj faris multfojajn balaadojn per

830,000 armeanoj, inter kiuj estis 174 fojoj da balaado, kies partoprenantaj japanoj superis mil. Kien la japanaj trupoj atingis, tie ili praktikis la politikon "ĉion bruligi, ĉiujn mortigi kaj ĉion forrabi".

En septembro de 1941, Jasuĝi Okamura, komandoro de la Ekspediciaj Fortoj en norda Ĉinio, persone komandis pli ol 100,000 armeanojn en grandskala "balaado" al la Shanxi-Chahar-Hebei-a Limregiono laŭ 13 vojoj. Subtenate de la partizanoj kaj milicanoj, la ĉefaj fortoj de la Oka-voja Armeo entreprenis efikan geriladon kaj post heroa tri-monata batalo mortigis pli ol 8,000 japanojn kaj puparmeanojn. En majo de 1942, 50,000 japanoj sub komando de Jasuĝi Okamura faris refojan ĉiuflankan "balaadon" al la bazloko de Centra Hebei. Kune kun la lokaj partizanoj kaj milicanoj, parto de la Oka-voja Armeo neflekseble militis du monatojn, mortigis pli ol 8,000 japanojn, inkluzive ilian brigadestron Saga Moto. Same fiaskis la japanaj agresantoj en sia balaado kontraŭ aliaj liberigitaj regionoj. Tial la armeo kaj popolo de la kontraŭjapanaj bazlokoj per siaj venkoj ŝanĝis la seriozan malfavoran situacion de la batalejo en la postfronto de la malamiko kaj multe helpis la kreskadon de la popolaj fortoj en la liberigitaj regionoj.

ĈIUFLANKA OFENSIVO KAJ LA FINA VENKO

En 1944 la armeo kaj popolo de la bazlokoj en la postfronto de la malamiko komencis sian partan ofensivon. En tiu jaro la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj kaj Sudĉinia Kontraŭjapana Taĉmento faris pli ol 20,000 batalojn, en kiuj ili mortigis kaj vundis pli ol 260,000 japanajn kaj pupajn armeanojn, reprenis 16 guberniajn urbojn, liberigis la areon de pli ol 80,000 kvadrataj kilometroj kaj emancipis pli ol 12,000,000 samlandanojn. Dume en la regionoj regataj de

Kuomintang la popolo leviĝis kontraŭ la aŭtokrata regado de Kuomintang, kontraŭ la enlanda milito kaj por demokratio, kio efike helpis la batalon de la popolo en la postfronto de la malamiko.

Por la fina venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito KPC kunvokis Sepan Tutlandan Kongreson en aprilo de 1945 en Yan'an, kiu alvokis senhezite mobilizi la amasojn, pligrandigi la popolajn fortojn por venki la japanajn agresantojn kaj starigi novan Ĉinion. En majo de la sama jaro la armeoj kaj popolanoj en ĉiuj bazlokoj kondukis grandskalan someran ofensivon. La 8-an de aŭgusto, post kiam Sovetunio gajnis venkon super la germanaj agresantoj, ĝi deklaris militon kontraŭ Japanio kaj ekspedis siajn trupojn al nordorienta Ĉinio laŭ tri vojoj. Tio markis, ke la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio eniris la lastan periodon.

La 9-an de aŭgusto Mao Zedong publikigis artikolon, alvokante la armeon kaj popolon de la tuta lando al ofensivo kontraŭ la japanaj agresantoj. La 10-an la Ĝenerala Stabo en Yan'an faris ultimaton al japanaj armeoj, ordonante ilin kapitulaci en difinita dato. La 11-an, kunagante kun la Ruĝa Armeo de Sovetunio, la Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj kaj ĉiuj aliaj armeoj gvidataj de KPC komencis grandskalan ofensivon al la japanaj agresantoj sur ĉiuj batalkampoj en norda, centra, kaj suda Ĉinio, kaj gajnis brilajn sukcesojn. La 14-an de la sama monato la japanaj armeoj deklaris senkondiĉan kapitulacion. Jen finiĝis la ok-jara malfacilega kaj kantinda Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. La ĉina historio eniris en novan periodon.


* *La Dek-punkta Kontraŭjapana kaj Nacisava Programo estas jene:*

1. *Faligi la japanan imperiismon;*
2. *Ĝenerale mobilizi la militfortojn de la tuta lando;*



Loulan—antikva urbo sub sablo

de CHEN HEYI



NENIO estas pli malgajiga kaj korprema ol la dezerto Taklimakan en Xinjiang. Tie kreskas nek herbo nek floro, vivas neniu animalo. Ĉie, ĝis kie la okuloj atingis, estas nur onde etendiĝantaj flavaj sablomontetoj. Ĉie, kien vi alvenas, vidiĝas la sama pejzaĝo. Ŝajnas, ke tie stagnis la aero, haltis ankaŭ la tempo. La tuta dezerto aspektis tiel kvieta, kvazaŭ ĉio jam mortis.

Sed kiu imagis, ke antaŭ pli ol mil jaroj tie estis la mondfama Silka Vojo, trafika trunko inter la Oriento kaj la Okcidento? Ĉu vi kredas, ke tie iam estis prospera antikva urbo Loulan (Kroraina)? Sed tio estis fakto.

Loulan estis antikva civilizita regno en la 2-a jc. a. K. Ĝia ĉefurbo ja estis la hodiaŭa Loulan-ruino. La regno havis lokon ĉe la okcidenta flanko de la lago Lop Nur. Kiam ni, post longa veturado, atingis la ruinion, trafis niajn okulojn unue la antikva fajrosignal-turo je 5 kilometroj norde de ĝi. Dum miloj da jaroj senkompata nordorienta vento plugis sur ĝi profundajn sulkojn, tamen ĝi firme staras sur la dezerto.

Trapasinte densajn termontetojn eroziitajn de la vento, ni venis al Loulan. Tie kaj tie vidiĝas senombraj starantaj lignokolonoj de domoj. Regis plena silento, tamen spiris viveco. Pli proksimen irinte, ni vidis en la centro de la urbo vastan placon, sur kies sablo duone elmontriĝis jen pecoj de lanteksajo aŭ silkajo, jen forlasitaj botoj, rompitaĵoj de delikate bakitaj fajencaĵoj, bidoj de koliero de damoj, moneroj de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) ktp. Sur la deklivo okcidente de la placo estas restaĵoj de alta tri-ĉambra domo el adoboj. La domo aspektis majeste, evidente antaŭe estis oficejo. Plu okcidenten irinte, ni vidis grandan vicon da civitanaj loĝdomoj, inter kiuj plimulto havas nur lignajn kolonojn kaj murojn el plektitaj branĉoj kaj leŭso, nur kelkaj restas relative kompletaj. Krom la tegmentoj, restas ĉiuj aĵoj, inkluzive la pordkadrojn, tamen falintaj kaj kovritaj de sablo.

Sur la altaĵo oriente de la placo estas ruino de grandioza templo. Dikaj V-formaj traboj, rondaj kolonoj, horizontalaj traboj, pordkadroj, fenestrokradoj falis en amaso tavolon super tavolo. Sed la apuda budhisma turo alta ĉirkaŭ 7 metrojn

kaj farita el adoboj, kvankam iom eroziita, tamen firme staras sur la loko. Verŝajne ĝi estis la plej alta konstruaĵo en la urbo Loulan. Ĉirkaŭe de la templo estas multaj domoj, inter kiuj nur kvadrata domo kun plata tegmento, kiu situas ĉe la sudorienta angulo de la templo, estas relative perfekta.

Estas bedaŭrinde, ke en la nuna Loulan ne estas akvo, kaj tie ofte furiozas mortiga ŝtormo, tial homoj ne povas tie resti longe. Ni forlasis la urbon en hasto, tamen niaj kunvojaĝantaj arkeologoj kontentiĝis pri sia rikolto. Krom fajenc-pecoj kaj antikvaj moneroj, ili kolektis ankaŭ iujn fer-objektojn kaj unu jadhakilon. Aparte inspira estas tio, ke ili trovis moneron de Kushan-dinastio. Tio atestas, ke Loulan havis kontaktojn kun Dayuezhi (Yüen-chih)-regno, kiu fondis sian ĉefurbon en loko apud la nuna Peŝavaro de Pakistano en la unua duono de la unua jarcento p.K. Poste, proksime de la urbo Loulan ili fosis el antikva tombo du sekigitajn kadavrojn de antikvaj loulan-anoj, unu el ili estas tiu de junulino.

Loulan-anoj apartenis al saj-gento, unu el la antikvaj gentoj de la

3. *Generale mobilizi la popolon de la tuta lando;*
4. *Reformi la politikan aparaton;*
5. *Alpreni kontraŭjapanan eksteran politikon;*

6. *Alpreni milittempajn financajn kaj ekonomian politikojn;*
7. *Plibonigi la vivon de la popolo;*
8. *Alpreni kontraŭjapanan edukatan politikon;*

9. *Elimini naciperfidulojn, projapanajn elementojn kaj sekurigi la postfronton;*
10. *Efektivigi nacian unuiĝon kontraŭ Japanio.*

periodo de la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) de Ĉinio. Ili havis profunde enkaviĝintajn okulojn, altan nazon kaj orajn harojn, portis altan pintan feltan ĉapelon kaj pintkapajn botojn kaj ĉirkaŭvolvis sian tutan korpon per fajna kaj kruda lanteksajoj. Loulan-anoj vivis en loko riĉa je akvo kaj herbo kaj plejparte sin okupis pri paŝtado, iuj pri fiŝkaptado aŭ ĉasado. Ili ne terkulturis, kaj la bezonata greno estis liverita de Cheshi-regno en Turpanbaseno.

En 176 a.K. Loulan fariĝis dependa lando de la pli kaj pli potenciĝanta servuta Huno-reĝimo, kiu potenciĝis ĉefe dank' al rabado, tial la malforta Loulan-regno devis ĉiujare omaĝi al ĝi grandan kvanton da kameloj, ĉevaloj, bovoj, ŝafoj kaj lanteksajoj. Krome unu princo estis sendita kiel ostaĝo.

Loulan-regno situis okcidente de la antikva grava urbo Dunhuang en la okcidenta Ĉinio. Por vaste kontakti kun landoj okcidente de Xinjiang, la tiama Han-dinastio elhakis la Silkan Vojon, tial ĝi neeviteble luktis kontraŭ Hunoj pro nepra transiro de Loulan. Komence Huno instigis Loulan bari la vojon kaj mortigi la senditojn de Han-dinastio. Plurfoje ofendite en 108 a.K., Imperiestro Wudi de Han-dinastio ekspedis dekmilojn da armeanoj por ataki la trupojn de Hunoj en Jushi. Tiam la regnestro de Loulan ĝuste estis tie kaj kapitulacis kaptite. 4 jarojn poste, kiam Han-dinastio ekspedis siajn trupojn al Dawan por ataki Hunojn, devigite de la lasta Loulan intencis per siaj propraj trupoj bari la vojon de la hanaj trupoj, tamen pro timo antaŭ la potencaj hanaj trupoj, ĝi ne kuraĝis tion fari. Sed la intenco estis malkovrita de Han-trupoj, sekve la regnestro de Loulan estis kaptita. Pridemandite li respondis, ke sen artifika moviĝo inter la du potencoj, la malforta regno ne trovas por si pacon, tial li deziras migrigi siajn popolanojn al loko, kie loĝas ankaŭ han-oj. Imperiestro Wudi

trovis liajn vortojn pravaj, sekve liberigis lin kaj postulis lin daŭre moviĝi inter la potencoj laŭ la cirkonstancoj. Tiamaniere pasis pli ol dudek jaroj. Poste An Gui here-dis la tronon kaj ŝanĝis la politikon de sia antaŭa regnestro, kaj rabis kaj mortigis trifoje la senditojn de Han-dinastio kaj tiujn de Dawan kaj Persujo al Chang'an, kaj ankaŭ karavanojn sur la Silka Vojo. Sub tiaj cirkonstancoj lia plijuna frato Wei Tuqi devigite fuĝis al Chang'an. En 77 a.K., Han-dinastio per sendita homo murdis An Gui kaj surtronigis Wei Tuqi.

Por eviti Hunojn, la nova regnestro Wei Tuqi translokis sian regnon sudokcidenten al la oazo Ruoqiang kaj ŝanĝis la titolon de la regno per Shanshan, kiu havis sian ĉefurbon en Yixun (la ruino de la nuna Milan). Kaj Han-dinastio establis en la loko de la antaŭa Loulan siajn administran kaj militan instituciojn, kies soldatoj terkulturis kaj prenis la lokon sub sia rekta administrado, por ke la Silka Vojo estu sekura. Dume la regno Shanshan senĉese disvolviĝis en sia nova teritorio kaj ĝis la mezo de la unua jarcento jam fariĝis unu el la potencaj regnoj en suda Xinjiang. Kaj en 445 ĝi estis pereigita de la Norda Wei-dinastio (386-534 p.K.).

Komence Loulan estis grava urbo sur la Silka Vojo, tamen pro tio, ke ĝia natura medio estis pli malavantaĝa ol tiu en Hami ĉe ĝia nordoriento kaj Turpan ĉe ĝia nordo, tial en la unua jarcento p.K. Han-dinastio kaj Hunoj luktis pro Hami kaj Turpan anstataŭ pro ĝi. Tamen ĉiuj dinastioj de la antikva Ĉinio ne forlasis sian administradon super Loulan, sendante tien administratajn oficistojn kaj garnizonajn oficirojn. Kun la disvolvo de agrikulturo ĉe la bordoj de la riveroj Tarimu kaj Pavo, pli kaj pli malmultiĝis la akvo en Lop Nur, sekve la klimato fariĝis pli kaj pli seka kaj la dezerto Taklimakan pli etendiĝis paŝon post paŝo. En 376, des pli

malboniĝis la naturaj kondiĉoj en Loulan. Vintre kaj printempe atakis senĉese ŝtormo, ruliĝadis fluanta sablo, kaj homoj kaj brutoj sin trovis sub minaco de elĉerpiĝo de trinkakvo, fine oni devis forlasi la lokon. Nun oni vidas en Loulan nur la ruinojn. Pro natura difektado de pli ol mil jaroj, ankaŭ la tiamaj prosperaj poploj fariĝis groteskaj lignoj.

La jam trovitaj restaĵoj atestas, ke Loulan en la fruaj tempoj estis influita ĉefe de la han-a kulturo. Poste pro la funkciigo de la Silka Vojo, precipe post kiam ĝi translokiĝis kaj alinomiĝis, ĝi akceptis influojn ankaŭ de kulturo de Hindujo kaj la Okcidento. La budhismo kredita de Shanshan-anoj kaj Qululingvo uzata de ili ja originis el la antikva Hindujo. La leteroj trovitaj en Loulan estis skribitaj grandparte en han-lingvo, dum tiuj en Shanshan estis skribitaj en Qululingvo sur lignoslipoj. En 1901, brita arkeologo Stein trovis en Niya tiajn lignoslipojn. Inter ili unu estas argilgravurita en han-lingvo kaj alia havas gravuritan helenisman statuon de diino Atena, kiu tenas ŝildon kaj fulmotondron en la manoj. El tio oni povas vidi, ke la kulturo de Loulan-Shanshan en la posta periodo fakte estis miksaĵo de kulturoj orienta kaj okcidenta. Tio sendube estas historia atestaĵo pri la kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj la Okcidento sur la Silka Vojo.



La kanto kaj danco de la jaŭ-oj

Fotoj de YAN JIN

La jaŭ-a nacieco nombras pli ol 1,200,000 membrojn, kiuj loĝas en Guangxi, Hunan, Yunnan, Guangdong kaj Guizhou de Ĉinio. La jaŭ-oj ŝatas kanti kaj danci. Dum kamplaboro unu jaŭ-a junulo laŭte kantas tamburante ĉe rando de kampo kaj la aliaj akompanas lin harmonie laŭ la takto de la tamburo. Ankaŭ la danco de la jaŭ-oj havas fortan vivetoson kaj nacian karakteron kaj estas bone akceptata.

Jaŭ-aj virinoj kantas
kaj dancas survoje.

Danco kun glavoj



Danco kun longa tamburo



Loulan—antikva urbo sub sablo

Fotoj de CHEN HEYI




La restaĵo de la urba oficejo de Loulan

Arkeologoj esploras sur tombejo de antikvaj Loulan-anoj.






Bela fajencepeco, kiu spegulas la kulturen nivelon de la antikvaj Loulan-anoj



Jada hakilo elterigita en Loulan



Fajrsignal-turo norde de Loulan



Restaĵoj de domoj en Loulan

乃洗
 先此
 溪中
 疏
 香义
 水日
 微池
 疾蓄
 用字
 真高
 神动
 于放
 更见
 晓能
 手貴
 如
 觀台
 8152

新
 屏
 鳳州
 非立
 是景
 物師
 自
 贊
 外



清
 香